

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 1



1970
~~1971~~
Marto 1971

Nürnberg

N-ro 2

ENHAVO

	Paĝo
O Sciigoj	
I. Pri la enhavo	1
II. ILEI — aferoj	1
La 12a Internacia Infana kongreseto	1
Unua Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn	3
Ekzamenordo de ILEI	3
Lernolibro	4
A Ĝeneralaj artikoloj	
Omaĝe al Jan Amos Komensky — Comenius	5
B Fakmetodaj kaj didaktikaj traktadoj	
Leglernado	9
Pedagogiaj Konsideroj pri la infan-desegno kaj infan-pentro	10
La Instruado de Esperanto (Dua sekvo)	12
C Informoj el la pedagogia vivo	
Kiel Instrui Instruistojn?	15
Profesiaj Komentoj pri la instruado de fremdaj lingvoj en Usono	16
La Asociaĵintaj Lernejoj — Projekto de Unesko	18
Recenzo: Lerta Leganto	19
Ĉ Opinio — propono — deziro — sciigo	
Pri Internacia Instruista Ekzameno	20
D Dokumentado	
Dekreto de la 23a de decembro 1964 pro aranĝo de la ekzameno. por akiri ateston pri kapableco doni bazan instruadon en fako Esperanto	20
Grava alvoko	
Parolas la eldonanto de IPR	25
Ĉu Udo Jürgens kantas en Esperanto?	26

I. Pri la enhavo

Rubriko A: Iom malfrue ni publikigas omaĝon pri Comenius. Kulpas teknikaj cirkonstancoj. Tamen, ili ne forprenas ion de la granda signifo de ĉi tiu famega pedagogo.

Rubriko B: Ŝajne la evoluo de hodiaŭa pedagogio nur celas la teknikan kaj matematikan homon ne plu konsiderante la tuton. Kiamaniere estu vidata ekzemple la infandeseĝo, montras artikolo el Italujo. — El Francujo estas artikolo pri leglernado, kiu certe respegulas la tiean diskutadon. Estus interese scii la diversajn metodojn en aliaj landoj legigi la infanojn. — Daŭrigata estas „La Instruado de Esperanto“. La redaktoro esperas, ke ankaŭ aliaj gekolegoj sendos artikolojn pri spertoj faritaj dum la instruado.

Rubriko C: La diskutado pri taŭga instruisto-klerigado certe kreskas en ĉiuj landoj. La raporto el Francujo tuŝas gravan problemon. — El Usono venis komentoj pri la tieaj lingvo-instruadoj (la redaktoro de IPR petas pliajn komentojn). — Ofte diskutataj estas la kieleblaj rilatoj al la Asociiĝintaj Lernejoj de UNESKO. Estas konsilinde kontakti kun ĝi. Kiamaniere vi povas kontakti legu ĉi-kajere. — Nova parto estas „Recenzo“, ĉi tie estas recenzita „Lerta Leganto“. Mi sugestas la estimatajn gelegantojn, mem recenzu librojn — ne nur pedagogiajn, sed ankaŭ pri nova literaturo.

Rubriko Ĉ: Kontribuoj bedaŭrinde mankas. La rubriko devus esti la fundamento de nia mondvesta kontakto. Ĝenerale estu dirate, ke laŭvide la esenco de nia revuo ne estas klare ekkonita, aliflanke devus esti sur la skribtablo de la redaktoro amaso da kontribuoj. Jen nur opinio de d-ro Szerdahelyi pri la ekzamenordo de ILEI.

Rubriko D: Ĉi tie vi trovas la dekretan de reĝino de Nederlando pri la ŝtata ekzamenordo por Esperanto-instruistoj.

II. ILEI — aferoj

LA 12-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Kongresejo: St. Mary's Bay School Holiday Centre, Romney Marsh, Kent, Britujo.

Konstanta adreso: 12-a Internacia Infankongreseto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Celo: La Infana Kongreseto, kiel konstanta institucio de la Universala Kongreso, celas eduki infanojn al internacia amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto. La kongreseto daŭrigas la ekzemplon kaj etoson de esperantistaj familioj, kiuj en la ĉiutaga vivo uzadas la Internacian Lingvon. Sed la Infankongreseto bonvenigos ne nur denaskajn esperantistojn, sed ankaŭ lernejanon, kiuj lingve bone progresis kaj kapablas partopreni en la kongreseto gvidata tute en Esperanto.

La infankongreseto estas edukejo, kie esperantistaj infanoj spertas en atmosfero de festa, sed disciplinita libereco, internacian vivon kaj solidarecon, sen iaj rasaj, naciaj, religiaj aŭ aliaj apartigoj. Ĝi celas kuraĝigi esperantistajn familiojn kaj ankaŭ geinstruistojn instrui Esperanton al la infanoj, krei kontakton inter diverslandaj gejunuloj, kiuj jam konas la lingvon kaj montri al la ekstera publiko la servojn de Esperanto por pli bona internacia kompreniĝado.

Datoj: La Infankongreseto okazos en feria centro St. Mary's Bay School Holiday Centre, de la vendredo la 30-a de julio ĝis vendredo la 6-a de aŭgusto 1971 kun aldona libervola restado de la 6-a ĝis 13-a de aŭgusto 1971. La geknaboj rajtas partopreni en la unua aŭ en ambaŭ semajnoj. La programo de ĉiu el la du semajnoj estos malsama. Pro kutimo de la centro oni devas komenci kaj fini la kongreseton je vendredo. La principa limdato por la aliĝo estas la 30-a de aprilo 1971.

Kondiĉoj: La Infana Kongreseto estas nepre rezervita al infanoj de 6 ĝis 16 jaraĵoj, kun eventualaj esceptoj en specialaj kazoj. Infanojn kun nekompetenta lingvoscio oni ne akceptas. Lerneja grupo estas akceptata. Pro la aĝodiferenco inter la partoprenantoj, la organizantoj kreas tri grupojn: infanoj 6—9 jaraĵoj, geknaboj 10—13 jaraĵoj kaj gejunuloj

14—16 jaraj. Tamen en la praktiko tiuj grupoj ne estos ĉiam aparte, ĉar en multaj agadoj pli gravas persona matureco ol aĝo.

Gvidantoj: La infanoj estos prizorgataj de pedagogie spertaj komisiitoj el diversaj landoj sub la ĉefa gvidado de s-ro Raif Markarian, lernejestro kaj prezidanto de ILEI. Por akceli la praktikadon de la komuna lingvo, la infanoj estos kiel eble kunligitaj laŭ aĝoj kaj miksitaj laŭ nacieco. La infanoj estos asekuritaj kontraŭ malsano aŭ akcidento ĉe Asekura Kompanio.

Kostoj: La infanoj ne pagas kongreskotizon. Kontribuo al la restadkostoj estas fiksita en la suba tabelo. Ĝi inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj tutan programon. Poŝmonon oni devas kunporti, sed la organizantoj estas pretaj respondeci pri la poŝmono de la geknaboj, se ili estos petitaj. Limigita nombro de infanoj estos invitita helpe de la fondaĵo „Adoptaj Gepatroj“, precipe infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nebonstataj familioj. Tiel la organizantoj ebligas al ĉiuj partoprenontoj agrablan ferioestadon.

Restado	Kostoj	ĝis 30/4	post 30/4*
30/7—6/8 1971	individua infano	65,5 gld = £ 7,5	70 gld = £ 8
	gefratoj kiuj samtempe ĉeestas aŭ anoj de lernejaj grupoj ĉiu po . . .	56,5 gld = £ 6,5	61 gld = £ 7
30/7—13/8 1971	individua infano	131 gld = £ 15	140 gld = £ 16
	gefratoj kiuj samtempe ĉeestas aŭ anoj de lernejaj grupoj ĉiu po . . .	113 gld = £ 13	122 gld = £ 14

Kongresejo: La feria centro St. Mary's Bay School Holiday Centre, Romney Marsh, Kent, situas ĉe la suda marbordo de Anglujo, inter Folkestone kaj Dungeness, je 24 km de Dover. La centro disponas pri ĉio necesa por ludoj, studoj, naĝado, ekskursoj kaj por ebligi la restadon kaj okupon dum ĉia vetero. La naĝebleco en la maro estas tute proksime de la centro. Pro la proksimeco al Dover, multaj gepatroj, kiuj vojaĝas per aŭtomobilo, sendube venigos siajn infanojn rekte al la restadejo survoje al Londono iam dum vendredo la 30-a de julio 1971. Por la aliaj aŭtobuso forlasos la Oficejon de Brita Esperantista Asocio (140 Holland Park Avenue, London W. 11) je la 16-a horo. La stacio de la subtera fervojo „Holland Park“ estas ĉ. 150 metrojn for de Oficejo de BEA. Tiuj geknaboj, kiuj forlasos la kongreseton la 6-an de aŭgusto estos veturigataj al Londono por alveni ĉirkaŭ la tagmezo al la Oficejo de BEA (adreso supre). La gepatroj rajtas mem veni por siaj infanoj en tiu tago. Tiuj geknaboj, kiuj forlasos la kongreseton la 13-an de aŭgusto estos ankaŭ veturigataj al la Oficejo de BEA. La gepatroj rajtas mem veni por siaj infanoj, sed nepre antaŭ la tagmezo. Por la lernejaj grupoj estos disponebla aparta aŭtobuso veturonta al Dover aŭ Folkestone.

Programo: Detala programo ne estas ankoraŭ fiksita, sed ĝi antaŭvidas ekskursojn, ludojn, konversaciajn grupojn, banadon en la maro, vesperajn festojn k. a.

Vizito: Por difinita tago la kongreseto invitos la gepatrojn, pedagogojn, ĵurnalistojn kaj ĉiujn interesitajn kongresanojn. Ekster tiu tago nur la gepatroj, korespondantaj geonkloj kaj legitimataj edukantoj rajtos viziti la infanojn.

Aliĝiloj: La aliĝilojn oni petu ĉe la konstanta adreso de la Kongreseto. Al la sama adreso oni direktu la pagojn kaj ankaŭ eventualajn proponojn por aliĝpagoj per fondaĵo „Adoptaj Gepatroj“. Oni bonvole notu, ke la nombro de akceptotaj infanoj estas limigita je 60 (sesdek).

Postrimarko:

Diversnaciaj geinstruistoj de Esperanto estas petataj sin anonci, se ili estas pretaj deĵori dum unu aŭ ambaŭ semajnoj. Deĵorantoj ricevos senpagan loĝadon kaj manĝadon, sed

*) akcepto de aliĝoj post la 30. 4. 71 okazas nur se restos liberaj lokoj.

ne la vojaĝelspezojn. Geinstruistoj kun intereso pri la 12-a Internacia Infankongreseto skribu al s-ro Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Essex, Britujo. Pliaj informiloj kaj aliĝiloj de la Infankongreseto 1971 estas riceveblaj ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

Unua Kunordiga Konferenco

por enkonduko de Esperanto en lernejojn

(inter la ŝtatoj: Belgio, Francio, Federacia Respubliko Germanio, Nederlando kaj se eble Britio — dependas de la decido de la sekcio) en Antverpeno, Belgio, de la 5-a de aprilo 1971 ĝis la 7-a de aprilo 1971.

Ĉiuj ILEI-Instruistoj en la menciitaj landoj estas kore invitataj, partopreni kaj kunlabori en ĉi tiu konferenco. Dum la ILEI-konferenco en Maribor ni povis konstati la sukcesplenan laboron inter Jugoslavio, Italio, Bulgario, Hungario kaj Aŭstrio, montriĝantan en la komuna plano aranĝi samtempajn, egalnivelajn instrueksperimentojn. Trijara laboro ankaŭ atentigis la ŝtatajn instancojn nun montrantajn ekkoneblan interesiĝon pri la eksperimentoj. Necesas fondi novajn zonojn — pro tio la invito.

S-ro Haazen dankinde estas preta, transpreni kunlabore kun la lokaj grupoj ĉiujn organizajn aferojn.

El la provizora programo: Podiodiskutado kun diversaj reprezentantoj (instruista sindikato) kaj ĵurnalistoj —

precizaj raportoj pri la stato (nombro de la instruistoj disponeblaj por instrui Esperanton, nombroj de la instruistoj fakte instruantaj, nombro de la Esperanto-lernejoj, de la infanoj, nombro de la infanoj ĝislernintaj Esperanton, internaciaj interrilatoj de la glernantoj) —

spertoj kaj metodoj gajni novajn instruistojn, metodoj esperantigi ilin, la ŝtata helpo, sinteno de instruistaj sindikatoj, opinio de la gepatroj, instruprogramoj laŭinstruataj, uzataj lernolibroj, propraj konkludoj kaj rezonoj — diskutoj, ebloj de kunlaboro laŭ strategia kaj taktika plano, laborgrupoj, rezolucioj, — vizito de la urbo, vizito de unu lernejo.

Bonvolu anonci vin jam ĉe sinjoro Jo Haazen.

Adreso: Groenstraat 12, 2510 Mortsels-Antverpeno, Belgio

Ekzamenordo de ILEI

IPR publikigis en n-ro 1 la novan ekzamenordon. Responde al la antaŭe jam dissenditaj ekzempleroj al la estroj de la ILEI-sekcioj pluraj gekolegoj nun interesiĝas, demandante la detalojn.

Antaŭ ol ni povos pritrakti ekzamenojn, necesas plenumi jenajn punktojn:

1. Fondado de la landaj akzamen-komisionoj

En la regularo ne estas fiksita la nombro de la membroj. Ĉi tie oni atentu la naciajn kutimojn. Regule apartenas al ekzamen-komisiono 3 personoj. Tamen estas rekomendinde elekti 6 komisionanojn inkluzive prezidanton, por ke ĉiam tri membroj estu disponeblaj.

Artikolo 2 (2) diras, ke ILEI-komisiono komisiu la landajn ekzamen-komisionanojn. Tio signifas, ke la landaj sekcioj proponas la elektitajn membrojn al la ILEI- ekzamenkomi-

sionoj. Certe ne estas ĉiam facile, trovi en ĉiu lando taŭgajn ekzamenantojn, ĉar la plimulto de la instruistoj simple lernis kaj iomete ekzameniĝis, sed kompare al postuloj de la nuna regularo restas pli-malpli granda distanco, eĉ estas sekcioj ne trovantaj eblajn kompetentulojn. Se la tezo estas ĝusta, ke la membroj de la komisionoj estu spertaj kaj bonegaj esperantistoj, ili nepre devus esti ekzamenitaj laŭ nia regularo aŭ ili jam posedas samnivelan atestitan kvalifikon. Instruistoj jam farintaj superan lingvan ekzamenon, povas lasi rekoni ĝin; tiam por ili nur restus disertacio kaj la metodika-didaktika ekzameno. Ekzamenantoj por tiuj du partoj estu la ILEI-komisiono. Tia agado estus relative simpla: La disertacion la kandidato rekte sendas al EKI; dum iu ILEI-konferenco li plenumas metodikan-didaktikan parton.

Membrigontoj de landaj komisionoj farintaj ŝtatan ekzamenon ekzameniĝu en tiu fako, kiu mankas. Por instruistoj, en kies lando ekzistas neniam eblecoj, ILEI aranĝu internacian studsemajnon (universitato Budapeŝto).

2. Enhavo (materialo) de la ekzameno

En artikolo 4 (2) estas fiksita, ke EKI devas krei plej eble objektivan mezurilon por la prijuĝo. Do, la ankoraŭ fondota EKI devas ellabori unuecan ekzamenmaterialon kaj sendi kolektite al la landaj komisionoj. Ĉar pro ekzamenaj kaŭzoj la materialo ofte estu ŝanĝita, EKI konstante disponu novigitan materialon.

Lernolibro

En Maribor ILEI decidis:

Koncerne al lernolibroj la komisiono opinias, ke en iu eksperimento devas esti uzataj la samaj lernolibroj por la akiro de pozitivaj rezultoj. Estu ankaŭ rekomenditaj diversaj aldonaj legajoj. Plue ĝi rekomendas la uzadon de la lernolibroj I kaj II de Szerdahelyi, kondiĉe ke la unua volumo estu esperantigita. La du libroj validas por infanoj ekde la aĝo de 10 jaroj.

Intertempe d-ro Szerdahelyi plenumis la kondiĉon plene esperantigi la lernolibron. Ĝi estas nun tre moderna lernolibro. Detala priskribo sekvas en IPR 1/71. Tamen mi estus tre danka, ke ĉiuj, kiuj pensas uzi la lernolibron, sciigus al mi la eble bezonatan kvanton.

Omaĝe al Jan Ámos Komensky - Comenius

D-ro Vlastimil Novobilsky CSC.

Unu el la plej signifoplenaj jubileoj, kiuj estas rememortaj de la tuta civilizita homaro en la jaro 1970, estas tiu de J. Á. Komensky. La 15-an de novembro 1970 pasis 300 jaroj depost lia morto.

Jan Ámos Komensky, ekster sia patrujo pli konata sub la nomo Comenius, naskiĝis en 1592 en malgranda sudmoravia vilaĝo Nivnice, /nuna Ĉeĥoslovakio/ kiel filo de simpla vilaĝa familio. Baldaŭ orfiĝinte li estis edukata de sia onkino. Relative malfrue li komencis studi latinan lernejon en Prerov /1608—1611/, post kies frekvento li studis kvar jarojn en Herborn kaj Heidelberg ligante tie siajn unuajn kontaktojn al renomaj sciencistoj. Post sia reveno hejmen li akceptis lokon de instruisto kaj en 1616 li estis konsekrita al eklezia pastro de la Frata Unuiĝo. En la moravia Fulnek, kie li pli malfrue akceptis postenon de la eklezia administranto kaj direktoro de la loka lernejo, li provas la unuan fojon sian novan instru-metodon kaj komencas verki /1618—1621/. En Fulnek travivis Komensky mallongan periodon de familia kaj patreca feliĉo; en la lernejo li estis amata de siaj lernantoj pro sia bonkora rilato al ili.

Sed nuboj de la tridekjara milito eligis la unuajn fulmojn: Fulnek estis draste bruligita de hispanaj soldatoj kaj pluraj valoraj manuskriptoj de Komensky transformiĝis al cindro. Estante persekutata pro sia religio li devas kaŝi sin en diversaj lokoj de Moravio kaj Bohemio; dume en Fulnek mortas pro pesto-epidemia lia edzino kaj du filoj, la dua nelonge post sia naskiĝo. Pro religiaj kaj politikaj motivoj li devas fine forlasi sian patrujon /1628/, foriras kun sia dua edzino al la pola Leŝno, kie li fariĝas instruisto kaj pli poste direktoro de la gimnazio. En Leŝno konceptis kaj skribis Komensky plurajn el siaj gravaj verkoj.

Ricevinte inviton de la angla parlamento li venas al Londono /1641—1642/ por prezenti tie siajn pansofiajn planojn (klarigo en la teksto), sed eksplodo de enlanda milito devigis lin forlasi Anglujon. Hezitante inter propono akcepti postenon de la direktoro de Harvard kolegio en Ameriko aŭ reformi instru-programon de svedaj lernejoj li akceptas la duan eventualaĵon kaj ekloĝas en Elblag /1642—48/. De tie li revenas al Leŝno, kie li estas elektita episkopo de sia religia komunumo. En 1650 li foriras por kvar jarojn en la tiaman Hungarlandon /Sarospatak/, kie li estis reformonta tiean lernosistemon laŭ siaj planoj. Post reveno al Leŝno ekflamis milito inter Svedujo kaj Pollando; Leŝno estis bruldetruita, kaj samtempe forbrulis multaj valoregaj manuskriptoj de Komensky, inter ili granda ĉeĥa vortaro, por kiu li kolektis materialon dum tutaj 40 jaroj. Akceptinte inviton de sia longjara subtenanto kaj amiko sinjoro de Geer li foriras al Amsterdam, gvidas tie eldonadon de siaj kolektitaj verkoj kaj mortas tie en 1670. En la proksima Naarden li trovas lokon por sia eterna ripozo.

Ĝis nun estas konataj ĉ. 250 verkoj venintaj el la plumo de Komensky, sed en arkivoj de diversaj landoj estas trovataj novaj kaj novaj nekonataj manuskriptoj. Verkoj de Komensky respegulas lian enciklopedian spiriton, kiu sciis en miriga nivelo absorbi la tutan tiutempan sciencon kaj kulturon. Li estis fondinto de la moderna pedagogio, alte aprezata filologo, klarpensata filozofo, profunda humanisto, religia pensulo, natursciencisto, energia postulanto de la ĝenerala homa klerigo, esence demokratia, alirebla al ĉiu homo sen diferenco kaj senlaca heroldo de justa paco en la militanta Eŭropo.

La plej grandan aprezon rikoltis Komensky sur kampo de pedagogio. Lia „Didactica Magna“, konceptita en lia patrujo kaj eldonita 1657, certigis al li nepaseman lokon en la monda kulturhistorio. Ĝi estis tradukita en plurajn lingvojn kaj per siaj brilaj ideoj li iniciatis reformon de la eŭropa kleriga sistemo. La tiamaj lernejoj — malmulte progresinta heredado de la mezepoko — praktikis mekanikan legadon, skribadon kaj tedan parkerumadon de latinaj tekstoj. Plie oni instruis iom da matematiko kaj muziko. Tiuj ĉi lernejoj — kun severa, ofte eĉ drasta disciplino — vekis nenium sopiron pri plua pli profunda klerigo. Kiel dirite, Komensky komencis studi iom malpli frue ol aliaj infanoj.

Eble pro tio li povis des pli klare konstati kaosan lerno-programon kaj timigan lerneja-atmosferon, en kiu la infanoj estis pasivaj objektoj de primitiva didaktiko, strebanta al

formala informo anstataŭ reala ekkono. Sur la fono de tiuj ĉi cirkonstancoj oni povas facile kompreni senton de liberigo, kiu ekregis, kiam la saĝaj reform-proponoj de Komensky estis publikigitaj kaj kiam ili estis praktike enkondukataj en lernejojn. Li postulas plendecide, ke la homa klerigo estu publika, al ĉiu sen diferenco alirebla kaj senpaga. Ellaborante ĝeneralan sistemon de klerigo Komensky proponas enkondukon de kvar instru-periodoj po ses jaroj:

lernejo familia /la gepatroj donas al siaj infanoj elementan instruon pri la mondo/, lernejo ĝenerala /organizata en ĉiu homa komunumo sen escepto/, lernejo latina /instruanta fremdajn lingvojn kaj liberajn artojn, troviĝanta en ĉiu pli granda urbo/ kaj lernejo akademia /po unu en ĉiu lando, kies instru-programo estos kompletigita per vojaĝado en fremdaj landoj/. La lerneja klerigo finiĝas do en aĝo de 24 jaroj.

Jen ni citu kelkajn postulojn de Komensky koncerne la instruadon: ĝi devas esti antaŭ ĉio adekvata al la mens-kapabloj de lernanto, ĝi estu interesa, facila, konciza, rapida, sencotrifa, daŭre efika kaj praktike utila. Ĝi ekzercu paralele ne nur prudenton, sed ankaŭ senton kaj volon. La lernejoj estu laborejoj de homeco, kie instruistoj kaj lernantoj laboru en amika atmosfero. La lernejoj eduku homojn anime kaj morale perfektajn.

Por tiel konceptita lerno-sistemo Komensky skribis adekvatajn lernolibrojn. Ni rememoru nur lian gloran „Janua linguarum reserata“ /lernolibro de la latina lingvo verkita en lia originala metodo, siatempe post la Biblio la plej disvastigita libro en la mondo/.

La alia, ne malpli glora, estis „Orbis pictus“, kiu estis la unua ilustrita lernolibro en la mondo. Ambaŭ libroj aperis en sennombraj reeldonoj. Serĉante por siaj lernantoj la plej efikajn lerno-metodojn, li skribis por ili instru-cele lerneajn teatraĵojn, ekz. „Schola ludus“, praktike esprimante tiel sian konvinkon, ke la infan-klorigo povas procedi ludforme.

Preterlasante plurajn sciencajn aktivecojn de Komensky mi volas dediĉi ankoraŭ kelkajn liniojn al lia filologia laboro, ĉar ĝi estas por ni, esperantistaj instruistoj, tre interesa kaj inspir-dona. Mi volas iom detale tuŝi lian filologie plej gravan verkon, nome „Methodus linguarum novissima“ t.e. La plej nova metodo de lingvoj. Kvankam tre ampleksa, ĉ. 400 paĝoj, ni legas ĝin tamen kun ĝuo, ne sentante ĝian maljunaĝon, ĉar ĝi estis konceptita kaj skribita kiel moderna libro de aŭtoro, ardanta por sia afero. Simile kiel ĉiuj verkoj de Komensky, ankaŭ tiu ĉi estis verkata en signo de la homa progreso, elimino de militoj, kvereloj kaj disputoj interhomaj kaj en sopiro pri la paca estonteco tralumita de beataj radioj de la ĝenerala klereco. La studo de lingvoj — laŭ Komensky — helpas al kompreno de aferoj kaj objektoj. Per tiu ĉi kompreno la homo evoluigas sian menson por ĝusta kompreno de lin ĉirkaŭbrakanta universo. Tiu ĉi kompreno, akompanata de la paralela morala evoluo, reprezentas premisojn por realigo de la feliĉa estonto.

Sed nun kelkajn vortojn pri la libro mem: ĝi enhavas 30 ĉapitrojn, kiuj traktas metodojn de la plej efika instruado kaj lernado. La kvintesenco de la libro estas la deka ĉapitro, ofte memstare represata sub titolo „Analiza Didaktiko“. Ĝi en koncentrita maniero sumas 187 gravajn regulojn, kiuj rilatas al la efika instruado. La ĉefan postulon esprimas Komensky per la konata devizo:

„Estas necese, ke lernanto lernu kaj instruisto gvidu.“ Bazo de la instru-procedo estu sincera amo al ekkono kaj al laboro ĝenerale. La instruisto estu specialisto pri sia fako, sed ne nur tio, li estu ankaŭ de la instru-materialo bona interpretanto, kiu en sia laboro ne konas enuon kaj maldiligentecon. Li devas esti kompleza al lernantoj, krei por ili ĝojan lerno-medion, ĉiam atenti ilian mensan evolu-ŝtupon kaj senĉese kontroli, ĉu ĉiuj el ili komprenis la instruatan problemon. Komensky principe rekomendas instruadon kolektivitan, ĉar ĝi alportas pli efikan rezulton ol la instruado individua. La instruado procedu de afero jam konata kaj de ĝi al afero nekonata. Ĉe la komenco oni instruu prefere nemultajn aferojn anstataŭ multaj, prefere simplajn ol komplikajn, proksimajn anstataŭ malproksimaj, ĝeneralajn anstataŭ specifaj, regulajn anstataŭ neregulaj.

Plurfoje akcentas Komensky paralelismen de vortoj kaj aferoj. Lernante vortojn oni devas unue lerni aferojn, ĉar per nura mekanika parkerlernado de vortoj oni eble bone trejnas

memorkapablon, sed per lerno de aferoj mem oni kulturis sian menson kaj metas fundamentojn por la efektiva ekkompreno de la mondo.

La instruado plie okazu en la medio de libervola disciplino, kie lernantoj amike konkuras pri siaj scioj kaj mem avidas sian klerigon. Oni instruu, daŭrigas Komensky, surbaze de prezentitaj ekzemploj kaj reguloj, per la propra uzo kaj imito. Tio signifas, ke la instruatano faktone prezentu al lernanto, kiam ĝi estas prezentita oni klarigu ĝin kaj kiam la lernanto ekkomprenis ĝin, li provu mem tiel longe per propra maniero ekspliki ĝin, ĝis kiam li estos fine kapabla fari tion ĝuste kaj precize. La ĵus citita regulo apartenas al la plej gravaj reguloj de instruado laŭ Komensky. La ekzemplo antaŭiru kaj nur post ĝia prezento sekvu regulo. Ju pli multaj ekzemploj, des pli solida estos ekkompreno de la afero. La reguloj inverse estu mallongaj kaj sencotrafaj. Oni ne instruu al lernantoj novajn aferojn, se la ripetado ne montras klare, ke la malnova afero estis plene komprenita. Alikaze la instruado fariĝas nur formala.

Pri la disciplino de lernantoj diras Komensky: ĉe la instruado, ĉe la agado tiel sankteca, ne estu batoj kaj kolero! Li prezentas 10 diversajn ŝtupojn de disciplino. La plej alta kaj dezirata estas disciplino fontanta el estimo al aŭtoritateco de la estimata instruisto. Sed Komensky konscias, ke iam disciplino devas esti akirata per admono kaj riproĉo. Se lernanto plenkonscie pekas kontraŭ la disciplino, li estu forigita de la kolektivo por ne ĝeni la ceterajn.

Atentindajn opiniojn esprimis Komensky pri metodo kiel alproprigi al si la konon: Oni ne povas kompreni aferon, kiu antaŭe ne estis perceptita pere de sensoj. Juĝo pri afero nekomprenebla estas falsa. Memorado de la nekomprenebla kaj neprijuĝita afero estas nedauŝa kaj necerta. Koni kaŭzojn de la aferoj signifas koni la aferojn mem. Kiel moderne sonas ĉi tiuj principoj, eldiritaj antaŭ pli ol tri jarcentoj!

Parolante speciale pri instruado de lingvoj Komensky avertas: Instruisto ne instruu tiom, kiom li povas, sed tiom, kiom la lernanto estas kapabla kompreni. Oni instruu rekte, sen ĉirkaŭvojoj, ĉar alie povas entuziasmo de lernantoj forpasi. Tamen procedu sisteme per ŝtupoj ne per saltojn. Sed oni procedu konstante, ĉar nur tiam aperos fruktoj. Nesistema lernado kaj praktikado de lingvoj ne alportas deziratajn rezultojn.

Komensky postulas, ke la instruado estu agrabla. Estas necese eviti enuon, la plej danĝeran venenon de lernado. Devigo estas kondamninda. Oni instruu kun amo, ĉar malafablico kaj kolero ne estas kongruaj kun la nobla instruista posteno.

La stud-programo estu konciza kaj la celo estu klara dekomence. Dum instruado oni eluzu tion, kio allogas lernantojn. Estas necese instrui nur aferojn utilajn kaj uzablajn, oni lernu por uzo kaj utilo. Nedisigebla de la instruado estas praktika ekzerco. Ĉio unua devas esti la plej bona: la unua ekzemplo, la regulo, la disciplino kaj la unua la instruisto mem. Ĉio, kion oni la unuan fojon instruas, estu prezentita malrapide kaj precize. Oni devas senĉese ekzerci kaj ripeti, ĉar ripetado estas medikamento kontraŭ forgesado.

Sen komento mi prezentis al vi la ĉefajn principojn el la libro „La plej nova metodo de lingvoj“. Sed eĉ tiel oni povas konstati, ke la plejparto el ili apartenas ĝis nun al la ora trezoro de la instru-arto. Kaj kiom da utilaj konsiloj kaj reguloj troviĝas en la libro por niaj instruistoj esperantistoj! Kiel ofte ni ekzemple pekas kontraŭ la regulo, ke instruisto devas esti mem alta specialisto pri sia fako por povi instrui la aliajn! „Eterna komenkantismo“ kaj aliaj avertaj fenomenoj en la Esperanta lingvoscio senvole intrudas penson, ĉu niaj instru-procedoj estas vere sciencaj kaj kvalifikitaj? Ĉiukaze legado de la menciita klasika libro kaj speciale de ĝia deka ĉapitro estas ne nur interesa, sed eksterordinare utila por niaj Esperanto-instruistoj kaj mi rekomendus enkondukon de tiu ĉi deka ĉapitro en la materialojn, kiuj estas postulataj ĉe la instruistaj ekzamenoj.

Grandan atenton dediĉis Komensky, krom al instruado de naciaj lingvoj, al la problemo de internacia lingvo. Enkonduke estu menciite, ke la nomo de Komensky estas en interlingvistiko nur malmulte kontata /kaj tio estas nia ŝuldo rilate al tiu ĉi progresema pensulo/. Nur por ekzemplo mi citu el la libro de Drezon: „Historio de la mondlingvo“ aperinta en 1931. Al Komensky li dediĉis nur 7 liniojn konstatante, ke li en sia libro Via Lucis „... profetis la tempon, kiam la homaro ĝuos la uzadon de universala helpa lingvo, nekompareble pli facilan kaj akireblan, ol niaj lingvoj naturaj“. Jen ĉio pri Via Lucis.

Drezen daŭrigas: „Pri la sama ideo li parolis ankaŭ pli malfrue en la V-a parto „Panglottia“ de sia verko „Panaugia“ /1662/. Tamen de tiu ĉi verko koŭserviĝis nur apartaj fragmentoj.“ Drezen ĉi tie erare citas nomon de la originala verko; „Panglottia“ li ne povis komenti, ĉar la manuskripto estis retrovita nur en 1935 en Halle/Saale, Germanio.

Mi opinias, ke la libro *Via Lucis*, meritas multe pli grandan atenton ol dediĉis al ĝi Drezen. Ĝin verkis Komensky dum sia restado en Londono /1641-42/ kaj ĝi fariĝis unu el fundamentaj ŝtonoj de lia monumenta verko „De rerum humanarum emendatione consultatio catholica“ /Ĝenerala konsulto pri reformo de la homa socio/. En la libro esprimis Komensky konvinkon, ke la esenca kondiĉo por reformo de la homa socio estas ellaboro de „pansofio“ kaj ĝia ĝenerala disvastigo. „Pansofio“ estas harmonia sistemo de sciencoj, sumo de la ĝisdataj homaj scioj, logike ordigita, surbaze de kiu la homoj povus ekkompreni la mondon kaj ankaŭ sin mem. La disvastigo de la rezultoj de „pansofio“, de tiu ĉi „Universala saĝo“, estas plue kondiĉo por enkonduko de paco kaj feliĉo sur la tero. Por akiri tiun ĉi staton de la socio estas necese starigi internacia akademion de sciencistoj, kiuj zorgus pri ellaborado de „pansofio“. Universalaj lernejoj poste disvastigus rezultojn de la „pansofio“ pere de universalaj lernolibroj al ĉiuj membroj de la homa socio. Por ke la „universala saĝo“ aŭ „universala lumo“ povu facile penetri al ĉiuj nacioj de la mondo, eĉ al nacioj plej malproksimaj kaj ĝis nun nekulturaj, estu por tiu celo kreita universala lingvo.

Al problemo de la universala lingvo estas dediĉita la 19-a ĉapitro de la libro *Via Lucis* /vd. artikolon „Nekonataj opinioj de Komensky“, Esperanto, majo 1970, paĝo 72/. En „Panglottia“ li traktas denove la problemon de universala lingvo, sed pli profunde. Enkonduke li studas tri manierojn, kiel pere de lingvoj povus esti vastigata la universala saĝo:

- 1/ Estus eble perfektigi lingvojn naciajn tiagrade, ke ili povu servi al tiu ĉi altpretenda tasko.
- 2/ Konvinki naciojn, ke ili akceptu kaj lernu nur lingvojn plej evoluintajn aŭ
- 3/ kompili novan lingvon
 - a/ racie elektante elementojn el la vivaj lingvoj kaj logike ilin kunmetante,
 - b/ konstruante lingvon sendependan de la ekzistantaj lingvoj, kiu estus sumo de logiko, efektiva spegulo de aferoj kaj la plej rafinita perilo de saĝo.

Komensky post interesaj meditoj konkludas, ke la plej bona solvo estus konstruo de tute nova lingvo, en kiu ĉiu vorto jam per sia sono esprimus karakteron de la afero. Aldonaĵo al „Panglottia“ estas „*Novae linguae harmonicae tentamen primum*“ /Unua provo pri nova harmonia lingvo/. Ĝi efektive ne estas finforme ellaborita projekto de nova lingvo, sed prefere, ni diru, hazarde kompilitaj elementoj el la granda filologia fantazio de Komensky.

La granda merito de Komensky estas, ke jam antaŭ 300 jaroj li serioze prezentis problemon de la internacia lingvo al la mondo, ke li plie filologie montris kaj pruvis, ke homo povas mem konstrui lingvon kaj montris modelon kiel procedi tiurilate. Kvankam li estis renoma latinlingva verkisto li kuraĝis malkovri kaj publikigi esencajn malavantaĝojn de ĝi. Komensky aperas en ambaŭ libroj kiel larĝsenca demokrato pensante pri granda plimulto de nekulturaj tiutempaj nacioj, por kiuj la latina lingvo estas tro malfacila pro sia komplikeco kaj nereguleco kaj kiuj ĝuste pere de uzo de la internacia lingvo salte enviĝus inter kulturajn naciojn. Inter liaj motivoj, per kiuj li pledas por enkonduko de internacia lingvo ne mankas nia nuntempa argumento, ke la komuna lingvo efike kontribuas al la tutmonda paco.

Legante ambaŭ menciitajn librojn ni admiras alte logikan pensmanieron de Komensky. Ĝi kondukis lin al pluraj konkludoj, kies esenca ĝusteco estis sendepende pruvita per laboroj de Zamenhof. La unua completa eldono de la libro „De rerum humanarum emendatione consultatio catholica“ fare de Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj /1966/ disponigis al lingvistoj, interesiĝantaj pri problemo de internaciaj lingvoj, okazon science studi precipe la kvinan parton „Panglottia“. Mi estas konvinkita, ke surbaze de tiuj ĉi studoj Komensky ekokupos en interlingvistiko althonoran lokon, kiun li sendube meritas.

Leglernado

Tio ĉi estas grava problemo, pri kiu oni diskutas ankoraŭ en Francio.

Du ĉefaj metodoj de leglernado estas uzataj:

la silaba (aŭ alfabeto, aŭ sinteza) la plej ofte uzata;

-la sensilaba (aŭ natura, aŭ analiza) malofte uzata, kaj la plej ofte kritikita.

Ne estas oficiala doktrino de leglernado, ĉar la oficialaj instrukcioj de 1923 deklaras:

„Ni rekomendas nenium metodon. Inter la fonetika kaj la silaba aŭ la sensilaba metodoj, ni faras nenium elekton. Spertoj daŭras, kiuj decidas.“ De 47 jaroj (preskaŭ unu duon-jarcento!) la responduloj de la nacia instruado kontentiĝis per tiu respondo, evitante ĉiun diskuton. Plurfoje Ministro Fouchet kondamnis, nediskuteble, la sensilaban metodon, tiam, kiam evidente li ne sciis, pri kio li parolis.

Kion oni riproĉas al tiu lasta metodo?

-la infanoj scias legi multe pli malrapide ol kiam ili uzas la silaban metodon. Sed kio estas scii legi? ĉu fuŝlegi, hezitante aŭ ĉu kompreni tion, kion oni legas?

-la sensilaba metodo estas respondebla pri la malbona ortografio kiun oni konstatas pli kaj pli en ĉiuj lernejoj. Tiu lasta riproĉo estas iom stranga, ĉar preskaŭ ĉiuj geinstruistoj legigas infanojn laŭ la silaba metodo.

Efektive, kelkaj misuzas la sensilaban metodon, kaj pro tio ne atingas favoran rezulton.

El kio konsistas, vere, tiu tre malkonata metodo? Ĉi baziĝas sur:

-intereso de la infanoj por la legado. „Oni opinias fari gravajn aferojn, serĉante la plej bonajn metodojn de leglernado; oni inventas skribtablojn, kartojn; oni transformas la ĉambron de infano en preslaborejon. Locke deziras, ke li leglernas per ludkubetoj. Ĉu tio ne estas inventaĵo bone trovita? Kia kompatindaĵo! Rimedo pli certa ol tio ĉio, kaj tiu ĉi, kiun oni ĉiam forgesas, estas la lerndeziro. Donu al la infano tiun deziron, poste forlasu tie viajn skribtablojn kaj viajn ludkubetojn; ĉia metodo taŭgos por li.“ (Rousseau: Emile, Libro 2a)

-genetika psikologio. „En la kompleksa koncepto de la alkompreno, kiel en tiu de la perceptado, la tuta skemo kaj la detalo estas solidaraj. Unu povas esti antaŭ la alia, kaj tiam esti sendependa de tiu ĉi, sed ĝi sekvigas la alian, kaj reciproke per nefinita iro kaj reiro. Tiu ritmo do efikas por analizi pli kaj pli detale kaj por sintezi pli kaj pli la tuton. Tiam, komence, nur la detaloj tre dikaj aŭ tre karakterizaj estas perceptitaj kaj nur la entutaj skemoj tre dikegaj estas konstruitaj. Komence, rezulte, la karakterizaj detaloj kaj la tuta figuro estas pli aŭ malpli intermiksita; poste per tiu komenca tuta alkompreno, analizo kaj sintezo plivastiĝas kune.“ (J. Piaget: Le langage et la pensée chez l'enfant — Lingvo kaj penso ĉe la infano.)

La infano perceptas ĝenerale tutajn skemojn, sed samtempe li kapablas fari analizajn perceptojn.

-Sturktura lingvistiko, „Estas granda iluzio konsideri terminon nur kiel unuiĝo de ia sono kun ia koncepto. Defini ĝin tiel, estus ĝin apartigi de la sistemo al kiu ĝi apartenas; tio estus kredi ke oni povas komenci per la terminoj kaj konstrui la sistemon sumiĝante la terminojn tiam, kiam male necesas komenci per la solidara entuto por havi, analize la terminojn, kiujn ĝi entenas.“ (F. de Saussure: Cours de linguistique générale: Kurso pri ĝenerala lingvistiko.)

„Resume, la sensilaba metodo estas, antaŭ ĉio, pedagogia agmaniero, kiu akceptas la spiriton de la infano kun ĝia originaleco kaj ĝiaj riĉecoj. Tia aktiveco de la spirito kiu entute ekkontaktas tekston, kiel ludante, sin turnas al konstanta pedagogio, kiu taŭgas por korpa edukado, por naĝado, por danco kaj kanto, primitivaj esprimoj kaj eminentaj entutoj“. (H. Wadier: la réforme de l'enseignement n'aura pas lieu: Reformo de instruado ne okazos.)

Por uzo de tiu natura metodo, necesas sekvi kelkajn simplajn regulojn: -Legigi al infanoj simplajn sed interesajn frazojn, kiujn ili povas facile kompreni; estas dezirinde legigi plej ofte mallongajn rakontojn, se eble kreitan de la infanoj mem.

-lernigi malrapide. „Fundamento de leĝlernada pedagogio estas ĉi tie: ne rapidigi la movadon kaj tute fidi al la nuna intereso . . . ceteraĵo koncernas nur pedagogiajn aranĝojn” (H. Wadier: verko citita).

„ĉu mi riskus prezenti ĉi tie la plej grandan, la plej ĉefan, la plej utilan regulon de ĉia edukado? Tio ne estas ŝpari tempon, tio estas perdi ĝin (Rousseau).

Laŭ mi estas grava eraro, ke la infanoj devas scii legi post unu jaro de lernado (dum la prepara kurso, je la sesa jaro). Oni atingos pli bonan rezultaton, se oni daŭrigos la leĝlernadon almenaŭ dum du jaroj.

-Plenumi multajn ekzercojn de analizo aŭ malkompono kaj de sintezo aŭ rekompono per la silaboj. La plej lertaj el la infanoj faras senhelve tiujn ekzercojn. Ekzemple, ili vidas ke **pa** troviĝas en patro, patrino, pano, k. t. p., kaj ke per tiu silabo oni povas formi novajn vortojn: paco, pagi, papero, k. t. p.

Sed estas necese helpi la plej mallertajn infanojn por fari tion.

Kial la silaba metodo estas pedagogie kaj science erara, kvankam ĝi estas la plej uzata en Francio?

-ĝi baziĝas sur malĝusta kartezio: malkomponi la malfacilaĵojn por atingi la plej malgrandan parteton, kiu estas la litero. Por la plenkreskuloj jes, sed ne por la infanoj, ĉar por ili nur la silabo estas la plej malgranda parteto kun senco.

-ĝi sekvas rigoran programon por lerni ĉiujn literojn, unu post la alia, kaj legigas ofte nur stultulojn, sen intereso por la infanoj.

-Tial ĝi ne kapablas vekti spiriton de la junaj ĝelernantoj.

Oni kredas, ke ili lernas pli bone kaj pli rapide per tiu metodo. Sed plej ofte, ili fuŝlegas, pene deĉifras kaj ne fariĝas legemaj.

Tamen, multaj ĝeinstruistoj plibonigis iomete tiun metodon, legigante sencajn frazojn, novajn vortojn sensilabe.

Ankaŭ kulpas, pri uzo de tiu metodo, aŭtoroj, kiuj verkas silabajn alfabetlibrojn.

Konkludo: — Iu supera inspektoro diris: „neniu metodo kapablas malebligi infanon por leĝlerni.”

„Tamen la elekto estas farota inter la tradicia metodo, subtenita de malĝusta kartezio, forta pro sia estinteco, forta precipe pro helpo de ĉiuj konservativismoj, senescepte la sociala kaj la politika, kaj la nova metodo (sensilaba, natura, aktiva) bazita sur scienco.

Estas necese ekleĝlerni komencante per solidara entuto (frazo esprimanta penson) por atingi analize la elementojn kiujn ĝi entenas.

Procedi alie, tio estas fuŝegi la menson, kaj fondi lernejon bazitan sur artefarito, sur malvero, sur morto!” (H. Wadier: verko citita).

J. BENISTANT

Pedagogiaj Konsideroj

pri la infan-desegno kaj infan-pentro

En la eduka kampo la infandesegno, la grafika arto de niaj infanoj havas valoron kaj signifon certe ne neglektendaj, eĉ laŭ mi, ne tro atente kaj efike zorgataj en nia lando, kie ofte la spontanea infanesprimo pli facile vekas entuziasmon aŭ admiron ol ĝi fariĝas objekto de atenta konsidero kaj studo, ĉiam riskante dilati la diskuton, por trafi la konstruajn elementojn per taŭga metodo al la didaktika formado de tiu, kiu devas agi en la instrumedio, por ke la kapabloj kaj bezonoj unue de la infano kaj poste de la junulo ne estu en disordo aŭ humiligataj aŭ pli malbone ne rekte sekvataj.

Sendube grava afero okazis de post kelkaj jardekoj; la publiko ĉiam pli larĝa komencis ŝati la infanografikan esprimon; la plenkreskulo komencas, eksenti instigita pere de pedagogoj kaj psikologoj, ke ekzistas kapabloj kaj instancoj, kiuj havas legitiman rajton al rekono kaj al estimo, ke la infana mondo (por sin esprimi per stereotipa dirmaniero) devas esti respektata kaj lokita en ĝiaj ĝustaj limoj, ke „la skribaĉaĵoj“ kaj la tiel diritaj „eraroj“ de la infanoj estis tro ofte konsiderataj kaj pli ofte submetataj al „la korektado“ aŭ pli malbone al la kondamno aŭ pli malbone vidataj aŭ konsiderataj per la plej indulga kaj „komprenema“ indiferento.

Mi povas citi pecon de enkonduko de Herbert Read al katalogo de British Council de la ekspozicio de la angla infandeseĝno (1941—42): „... kvankam la fundamenta funkcio de la arto en la edukaj sistemoj estas problemo tre malproksima de la kompleta solvo, ĝi tamen akiris pli vastan rekonon kiel studobjekto, precipe en la unuaj stadioj de evoluo; kaj tiun rekonon oni akiris kiel konsekvenco de la revolucia reformo, kiu okazis ĉu en Europo, ĉu en USONO en la sistemo de koncepto pri arta deseĝno. La historio pri ĉi tiu movado reiras al ĉirkaŭ antaŭ 50 jaroj kun pioniroj, kiuj nomiĝas Ebenezer Cooke kaj James Sully. Estis tamen la Viena profesoro Cizek, kiu antaŭ ĉiu alia evidentigis avantaĝojn ĉu psikologiajn ĉu estetikajn, kiuj devenas de la liberigo de tiu krea impulso estanta en ĉiuj infanoj; kiel estis lia, la malfacila tasko revenĝi la estetikajn valoron de la deseĝnoj de la infanoj. Sed tamen en ĉi tiuj lastaj 40 jaroj, la kreskanta laboro de revenĝo de la primitiva arto kaj la novaj evoluoj de la moderna pentrarto profunde kontribuis alkonduki la infanarton en la kampon de la estetika valoro.“ Estas sistemo de enfokusigi la problemon, sed mi opinias, ke en tiu ĉi modo ĝi prezentas ankaŭ riskon, danĝeron, kiu ŝajnis, ke mi aŭdis en kelkaj vortoj skribitaj antaŭ 90 jaroj de Herbert Spencer: „... la problemo ne estas en la scio ĉu la infano bele deseĝnas; ĝi estas alia: tio estas scii ĉu li evoluigas aŭ ne siajn kapablojn...“ kaj laŭ tiu ĉi aspekto ŝajnas al mi, ke Spencer antaŭsentis tiun danĝeron pri kiu mi nun parolas.

Sur la eduka plano la funkcio de la lernejo ne estas ĉefe prepari artistojn, ĉar ne estas ĝia tasko, sed ne sufoki la kreaĵon eblecon de la knabo disponigante median etoson, kiu permesu kaj instigu la spontaneecon. En tiu ĉi senco la deseĝno atingas profundan gravecon, kaj de tiu ĉi flanko la estetika koncepto limigus la efikon de la deseĝno, ĉar ĝi praktike forigus tiujn infanojn, kiuj ne havas artan talenton kaj samtempe ĝi ne kontribuis al la ekiĝo de la gusto, de la arta sentemo, al la kapablo sinrenovigi kaj ĝoje revivi tion, kion la artisto donacas al la homaro, ĝi forigus la infanojn malpli dotitajn kaj orientitajn. Kaj tiel la psikologia vidpunkto permesas al ni agi tiel, ke oni kaptas per la esprimo la elementojn, kiuj kreas aŭ povas krei la kondiĉojn kaj la referencojn plej aŭtentikajn por sincera kunlaboro kun la infano kaj permesas ankaŭ „malbloki“, liberigi, kuraĝigi „lian-ŝian“ fantazian potencon.

Rememorigante ĉi tiujn motivojn kune kun ombroplena historia noto, mi mallerte min metis en problemon, kiun mi tute ne konsideras malpli grava kaj kontraŭ ĉiuj opinioj tute ne solvita; la fakto estas, ke sin meti antaŭ deseĝnaĵo, pentraĵo de iu nia infano estas jam sin meti survoje al serĉado de formigo kaj konstruo de konscienco de homa persono; estas enkonduki paroladon, kiu investas el profundo ĝis la radikoj tiun, kiu estas la ĉefa temo de la enketo, kiu vin devigas kaj alnajligas al la ĝenerala problemaro.

De la unuaj signoj, kiujn la infano skizas senkonscie kaj sendaŭre, al la unuaj koloroj, kiuj lin allogas, al la kromaj manifestacioj, kiujn la infano esprimas per kraĵono, kiel se ĉirkaŭ li ne estus mondo, sed estus nur lia ĉeesto en „lia“ aŭtogenetika mondo ĝis la peniga serĉado, kiun li ne povas ne altrudi en la frapigo, kiun li ricevas por ĉio, kion li trovas antaŭ si kaj kontraŭ kiu li devas batali kaj lia fantazio devas fariĝi, por paroli per efika esprimo de la XIX jarcento, „korprika“ ĉiam pli; ju pli la infano kreskas, des pli li daŭre spertas la tiel diritan „veron“ de la naturo kaj la preman mordadon de la memoro, ĝis li sentas sin perdita, dum malaperas tiu origina impulso aŭtogenetika, kiu promesis konstruanton, dum tiu, kiun ni povas difini „eksteran mondon“ celas igi lin maksimume lerta imitanto. Estas vere en tiu ĉi momento, ke la infano sentas la ne esprimitan impulson, eĉ ne petata, sed viva etike, aganta de iu estaĵo pli riĉa ol li je sperto, kiu lin helpu, kiu lin gvidu, kiu lin kuraĝigu, sed kiu ne anstataŭu lin, kiu precipe ne perfortu lin en la delikata momento de lia formiĝo kaj ekĝermo al la vivo de la „plenkreskuloj“; sed estas vere bedaŭrinde en ĉi tiu situacio kiel eble plej supersentema, ke ni, gepatroj kaj in-

struistoj, „aldonas“ kaj aldonis en la pasinteco, kaj daŭras aldoni en la nuntempo, senŝanceliĝe kaj aŭtoritate, (ĉiujn malbonaĵojn oni faras „aŭtoritate“) nian sperton kiel plenkreskuloj kaj „spertuloj“ kaj pigraj komformistoj kaj „skemistoj“.

La eduka fiaĵo estas farota kaj kiel rimarkis Ferrieri en 1922a en fama libreto, ĉiu edukisto neniam devas forgesi, rediri akurate sian pentkonfeson: „ . . mi devas fari konfeson: multe antaŭ la milito de 1914—18 mi sentis identan ekstremon pro timo kaj kompatio. Multe antaŭ la detruigo de la korpo mi ĉeestis alian detruigon, tiun de la animoj, la detruigon de la senkulpuloj, kiun de tago al tago okazigis la lernejo, kie regadis la ĝojo de la vivo, ĝi alvokis turmenton, kie triladis gajeco, ĝi enmetis la gravecon, anstataŭ la spontanee movadon, ĝi pretendas la senmovon. Anstataŭ la voĉoj kaj la ridetoj estas la silento . . .“

Eble mi dilatigis mian prelegon preter la limojn, sed mi opinias, ke ĝi ne estas ekster la bazaj instancoj, kiujn ĉiu edukisto, kiu klopodas esti tia, ne povas serioze ne senti ilin kiel imperativajn.

Al tre juna Teeteto, kiu malkaŝadis al Sokrato sian deziregon al la kono kaj la ne kontentigitan sed vivan suferon de sia intima kapablo al la kono, sepdekjara Sokrato respondis: „Fidu je vi mem . . . tiuj, kiuj diras ke ili lernis el mi, vere el mi ili nenion lernis, sed tamen kaj nur el si mem multajn aferojn kaj belajn ili eltrovis kaj kreis; sed la merito de la helpo por la kreado, tiu, jes apartenas al Dio kaj al mi.“

Malantaŭ Teeteto „en nuco“ estas kiel eble viva kaj spontanea la signo de kraĵono revelacia kaj reviviga de ĉiu nia infano, kiel malantaŭ la tre homa mieno de la granda Atenano devas esti, ne povas ne esti, la inteligento kaj la pasio de la aŭtentika instruisto.

Prof. Fidia Arata (Docento pri teoria filozofio — Pisa Universitato)

Esperantigis: Catina Dazzini

La Instruado de Esperanto

(Dua sekvo)

Rektoro Helmut Sonnabend

Ĉiam leviĝas la demando, kiamaniere devas esti konsiderata la metodo: Ĉu mi devas sekvi la gramatikan, ĉu la rektan aŭ la intermiksitan metodojn. Aliaj gravigas la strukturan metodon, aŭ festas kiel novaĵon la programitan. Tamen ekzistas tuta aro da bonaj esperantistoj, kiuj ignoras ĉiujn metodojn, ĉar en ia formo ili lernis la lingvon el la simpla kaŭzo — ili volis lerni. Nun, tio ne tuŝas nian problemon, — iam oni devus detale esplori la lernmanieron de tiuj homoj, kaj mi hipotezas la fakton, ke ankaŭ ili lernis laŭ certajn leĝojn lingvajn.

Revenante nun al la supre menciitaj metodoj mi asertas, ke ĉiuj al ni konataj metodoj, kiuj eĉ kontraŭas al la gramatika, tamen sekvas ĝin, se ankaŭ en kaŝita formo. Kion mi volas diri, estas jene: Nepre ni devas malligiĝi de la gramatika strukturo kaj nur sekvi la psikologian vojon destinatan de la homo mem. Komprenable estas tute nature, ke ni ofte inklinas gramatigi la instruadon, tio devenas de la fakto, ke ni kutimiĝis al la gramatikaj vidpunktoj komence de nia infaneco. Rememoru vian lernejan tempon! Do, absolute erara estas la starpunkto, ke oni povas lerni lingvon laŭ la gramatiko. Lingvo estas ĉiam vivanta organismo, estas energio. La elirpunkto ne povas esti iaj gramatikaĵoj, sed nur la lingvo mem. **Ni devas inversigi la vojon surbaze de la didaktikaj ekkonoj: La lingvo estu lernata el la lingvo mem, kaj per la lingvo oni lernu la gramatikon** (cetere sufiĉe grava por ĉiuj lingvoj). Mi precizigas: Gramatikaĵoj estu nur tiam pritraktataj, kiam la lingvaĵoj estos sufiĉe parolataj, kiam la lingvo-povo mem ekzistigos la bezonon al klarigoj pri gramatikaĵoj, sed ankaŭ tiam ili ne estos instruataj, t. e. ne instruu la gramatikon, sed nur konsciigu ĝin el la lingva bezono. Jen ekzemplo: Jam delonge uzas viaj gelernantoj la formojn: purigi, blankigi, klarigi, sciigi en multaj diversaj frazoj tute nature kaj sen eraroj. Iutage surtabuligu la vortojn — bone laŭvice — kaj klarigu la sencon per malmultaj vortoj. La gelernantoj verŝajne diros: Aha, kaj la afero estas en ordo.

Ni turnu nin denove al la praktika instruado. En mia lasta artikolo mi priskribis lecionon el la nomfunkcio per imitado, kaj mi emfazis la necesecon alporti la lingvon ĉiam kiel tuton. Por pli ampleksigi ĉi tiun ŝtupon, mi donos pluan ekzemplon. Nepre gravas la fakto, ke oni ne nur donu unu lecionon el la nomfunkcio, sed almenaŭ kvin.

Antaŭ ol mi nun priskribos la novan lecionon, mi devas averti antaŭ fatala eraro. Ne pensu post legado de la leciono, tia maniero ne taŭgas por plenkreskuloj aŭ junuloj. Ekzistas kompreneble diferenco inter infanoj kaj ili, sed ne en la lernprocezo, jen regas ĉiam la samaj kondiĉoj kaŭzitaĵ de la samaj instruleĝoj. Oni povas eĉ konstati ke plenkreskuloj pli malrapide lernas.

2a leciono:

Elirpunkto: La viroj kaj la kotletoj

Lingva celo: Substantivoj

Apliko: Imitado en la ŝtupo de la nomfunkcio

Cetere: Antaŭ ol vi komencos novan lecionon neniam forgesu ripetadi — kaj tio tre zorgeme — la antaŭan, ĉar ripetado estas la patrino de la saĝeco.

Instrurimedo: terpomo, vinbero, citrono, tomato, karoto, salato, banano, butero, margarino, marmelado, pizoj, kotleto, asparago, kelo.

1. Aŭdado de la surbendigita lingvaĵo:

Enkonduku viajn gelnantojn en la situacion, vi ja povas ankaŭ interligi ĝin kun la naskiĝtago. Post la kafado, post la trinkado la gastrondo havas vespere la deziron manĝi ion. Do, oni decidas kuiru.

Nun, jen la lingvaĵo:

Komence oni aŭdas kanton (ne devas esti en Esperanto) kaj poste tintos la glasoj.

Diversaj voĉoj: Sanon! Sanon! Sanon!

Dieter: Nia naskiĝinfano, ĝi vivu alte!

Aliaj: Jes, ĝi vivu alte!

Horst: Dankon, karaj amikoj. Mi trinkas je via sano. Sed mi nun estas tre malsata. Vi ankaŭ?

Rüdiger: Jes, mi povus manĝi.

Aliaj: Jes, mi ankaŭ.

Horst: Kiu ŝatas kotleton?

Ĉiuj: Ni tre ŝatas.

Horst: Kun terpomoj aŭ sen?

Helmut: Lasu la terpomojn en la kelo!

Ĉiuj: Jes, en la kelo!

Horst: Kiu volas kotleton kun marmelado?

Ĉiuj: Brrr!

Horst: Nun, en Aŭstrujo la homoj tre ŝatas tion. Sed kiu volas havi asparagojn kaj pizojn?

Dieter: Tio estas tre bona ideo.

Rüdiger: Sonas kiel sinfonio.

Horst: Ĉu vi ŝatas saŭcon el margarino aŭ butero?

Helmut: Hm, asparago en bona butero, tio estas la pinto de la gusto.

Horst: Mi havas ankaŭ karotojn tre delikatajn.

Dieter: Aldonu nur!

Horst: Kaj sur la kotletojn ni gluetigas citronosukon. Kiu ŝatas tomatojn aŭ salaton?

Rüdiger: Mi dirus, ni prenu ĉion.

Aliaj: Jes, faru nur!

Horst: Kiel deserton mi proponas vinberojn kaj kelkajn konjakojn. Aŭ ĉu vi volas havi bananojn. Mi havas tre freŝajn.

Helmut: Bananojn vi povas ŝpari por la simioj.

Ĉiuj: Jes, ni ja ne loĝas en zoo.

Horst: Bone, kaj mi proponas, ni ĉiuj kuiru kune.

2. Alkutimiĝo al la lingvo-sono per plurfoja aŭdado:

Kiel jam montrita en la antaŭa leciono, mi emfazis la ripetatan aŭdadon, ĉar lastsence la parolado sekvas la komprenon de la lingva aŭdado.

La elektitaj objektoj estas facile rekoneblaj. Tamen, kiel bona instruisto vi kunportis ilin aŭ en konkreta aŭ en bilda formo. Ilin surtabligu dum viaj gelernantoj aŭskultas. Ankaŭ tio estu ankoraŭfoje dirata: Donu trankvile la tradukon, tia faro neniam kontraŭas la lernprocezon.

3. Fazo de la nomfunkcio (imitado)

Bone videble kuŝas aŭ staras la objektoj sur la tablo:

terpomo, vinbero, citrono, tomato, karoto, salato, banano, butero, margarino, marmelado, pizoj, kotleto, asparago, suko, konjako. Dum la aŭskultado viaj gelernantoj jam konstatis la facilecon de la vortoj kaj probable ili senklopode povas nomi la objektojn. Do, nomigu la objektojn fare de la gelernantoj. „Tio estas . . .“ estas natura formo de la nomfunkcio, Do, laŭtbuŝe ili diru: tio estas butero, tio estas kotleto, ktp.

Pri la jam aplikitaj ekzercadformoj vi povas relegi en la numero o de nia revuo. Sed ne forgesu ankaŭ intermiksi la konatajn objektojn!

4. Plia formo de la ekzercado:

Multaj eminentaj pedagogoj akcentas la gravecon de la ludo dum la lernprocezo, ĉar la inklino al la ludo estas tre elementa eco de la homo. Kion utilas la plej taŭga didaktiko, se la instruisto malobservas la psikologian flankon de la instruado. Tio estas ankaŭ unu de la ĉefaj punktoj de la instrukapablo de la instruisto: ĉiam denove trovi vojojn por interesigi la gelernantojn. Uniforma instruado estas ĉiam la morto de la lernado. Mi nun priskribas du diversajn ludojn ege taŭgajn subteni nian intencon:

a) Kiu vorto kuŝas en la kesto (skatolo)

De ĉiu objekto faru surskribitan karton. Do, sur unu karto estu skribita „tomato“, kaj sur la alia „salato“ ktp. La kartoj havu la dimenziojn 10 cm × 30 cm, ĉar tiel vi povas uzi ilin por aliaj utiloj. Metu nun unu karton tiel en sufiĉe grandan skatolon, ke la gelernantoj ne vidu la vorton.

Limigu la vortrezoron inter 15 ĝis 20, kaj por ke viaj gelernantoj ne perdu la super-rigardon, skribu la al la ludo apartenantajn vortojn sur la tabulon

La taskoj por la unua nun estu, ke ili divenu la vorton en la skatolo. Ekzemple kuŝas en la skatolo „kravato“. Ili divenu tiel longe, ĝis iu nomos la ĝustan vorton.

La didakta senco estas facile rekonebla: la daŭra imitado kaj aŭdado; kaj ĉiu nomiganto de la vortoj estos samtempe la lingva medio por la aliaj. Ĉiu kiu „venkis“ dum la divenado havu la rajton, enmeti novan vorton en la keston. Estu certigita, ke la didakta ludo ne nur ĝojigas infanojn.

b) Mi vidas, kion vi ne vidas

Tio estas jam malnova ludo, kaj certe ankaŭ vi bone konas ĝin. Tamen por lingva ekzercado ĝi en sufiĉe amuza formo instigas la lernfervoron de viaj gelernantoj.

Prenu nun la supre menciitajn kartojn kaj distribuu ilin bone videble en la instruĉambro, entute vi jam havas 32 kartojn. Iu ajn el la lernantoj forlasu la ĉambron. La aliaj fiksu unu karton, ekz. sur kiu staras „butero“. Nun oni envoku la atendantan lernanton kaj oni diru: Ni vidas, kion vi ne vidas. La demandito nun havu la rajton nomi 5 vortojn. Se inter la kvin troviĝos la ĝusta, li estos „venkinta“, aliflanke li donu ludan garantiaĵon. Certe vi povos elpensi aliajn variantojn.

5. Fino de la leciono:

Kiel jam dirite en la antaŭa leciono N-ro 1 aŭdigu denove la lingvajon, kaj ankaŭ distribu la tekston. Eble lasu laŭte kunlegi, tiel viaj gelernantoj kutimiĝos al la lingvo. Kutimiĝo estas ĉio — ankaŭ ĉe lingvoj.

Kiel Instrui Instruistojn?

Daŭra klerigo de la instruistoj estas unu de la aspektoj de la reformbezono diskutata en Francujo kaj cetere en aliaj landoj. La problemoj ŝajnas aparte malfacila en la elementaj lernejoj. Ĝis lasta jaro la oficialaj instancoj tute simple ignoris ĝin. Antaŭ 1940 preskaŭ ĉiuj geinstruistoj ricevis sian profesion formadon en porinstruistaj seminarioj inter 16—19 aŭ 17—20 jaraĝo. Poste ili instruis dum sia tuta kariero laŭ la tiam akiritaj principoj. Pedagogio ŝajnis pli arto ol scienco. En la porinstruista seminario la profesoro atentis pli pri la kulturo ol pri la pedagogia kapablo, kiu, oni pensis, venos per la praktiko mem. Tial kelkaj geinstruistoj, kiujn oni bezonis pro nesufiĉa nombro de la aliaj, ne studis en seminarioj kaj tamen post 4 aŭ 5 jaroj en la metio ricevis pedagogian ateston.

Post la milito la bezono pri instruistoj en elementaj lernejoj fariĝis tiom granda, ke tute ne sufiĉis la seminarioj. Por instrui rapide multajn kandidatojn al porinstrua profesio, estis kreitaj pedagogiaj kursoj, kiujn la ĵus bakitaj geinstruistoj devis sekvi dum la libera tempo ekster la lerneja laboro. Ofte la junaj „lernejmastroj“ devige faris ĉiusemajne longan vojaĝon al la urbo, kie tiuj kursoj okazis. Krome ili laboris ĉiutage pli ĝuste ĉiunokte, al skribitaj taskoj korektotaj de la inspektoroj. Post kvin jaroj, se ili sukcesis la ekzamenon, ili ricevis pedagogian ateston. Tiam oni konsciis, ke pedagogio estas scienco, kiun oni devas studi. Samtempe oni komprenis, ke, same kiel alia scienco, pedagogio evoluas. Do, kursoj al malnovaj instruistoj estus utilaj. Tiam oni al kutimiĝis al instruperiodoj, kiuj plejofte okazis dum libertempo (Kristnasko, Pasko, somero). Geinstruistoj diversaĝaj estis grupitaj kaj ricevis konsilojn, informojn, montrojn pri novaj metodoj en kelkaj fakoj: korp edukado, muziko kaj pri „moderna pedagogio“. Al tiu modo de instruperiodoj multe kontribuis la anoj de la tiel nomita „Freinet-movado“, kiuj kunvenis por montri kiel oni praktikas aktivajn metodojn pere de materialo simpla por skribi, presi, multobligi, desegni, teksti, kudri ktp. Tion ili faris memvole kaj kelkfoje kontraŭ la volo de la oficialaj instancoj. Sed iom post iom eĉ tiuj ĉi aliĝis al la „moderna skolo“.

Tamen oni devis atendi ĝis 1969, por ke la Ministerio pri Nacia Edukado konsentu, ke konstanta formado de la geinstruistoj estas nepre bezonata. Dekreto donis eblecon dum la labortempo por sinperfektigo de la geinstruistoj en elementaj lernejoj. Ĝis tiam tiuj ĉi devis instrui dum 30 horoj ĉiusemajne. Post la dekreto ili devas instrui 27 horojn. Dum tri aliaj horoj ili devas sin perfektigi kaj sin adapti.

La kaŭzoj de tiu ŝanĝo estas ne nur la novaj pedagogiaj metodoj kaj la novaj instruiloj, sed ankaŭ la grava evoluo de la socio mem. Instruisto ne plu estas „sola mastro“ en sia lernejo. Li devas kunlabori kun la gepatroj, kiuj grupiĝis en asocioj, kun la kuracistoj, kiuj pli kaj pli ofte observas la sanstaton de la gelernantoj, kun la psikologoj, kiuj decidas aŭ konsilas pri la venontaj studoj kaj profesioj de la infanoj.

La ĉefa malfacilo de la instruo en elementa lernejo estas akordigi du gravajn influojn ricevitaj de la infanoj. Unuflanke la socia medio donas al ili multflankan instruon sen bazo, sen plano, sed ne sen danĝero, per kino, televido, elektraĵoj, elektronaj ludiloj, aŭto-vojaĝoj, libertempo en infangrupoj ktp. Aliflanke la influo de la instruisto devas ebligi naturan propran evoluon de la infana personeco.

Oni emas nun agnoski edukadon ne kiel akiro de konoj sed prefereble kiel ekzercado de la propraj kapabloj de ĉiu infano. Instruisto ne plu lernigas tion kion li mem scias, li gvidas la aktivecon de la geinfano, por ke tiuj ĉi akiru pli da lerteco kaj pli da juĝkapablo. Poste dum lastaj lernjaroj ili elektos pli libere do pli konsente la fakon (aŭ fakojn), kie ili deziras labori. Ili havos tiam pli klaran konscion pri sia vivcelo.

Komprenable la problemoj estas diversa laŭ la aĝo de la gelernantoj, sed ĉie, ekde la infanĝardeno aŭ bublernejo ĝis fakultato la obstakloj estas samaj: nesufiĉo de konsciaj geinstruistoj, nesufiĉo de loko (lernejoj, sportejoj, naĝejoj . . .), nesufiĉo de monrimedoj, nekomprenemo de la ĝenerala publiko.

La nova reformo, kvankam tre modera, ne plaĉas al ĉiuj. Gepatroj ne komprenas, kial oni mallongigas la instrutempon de siaj infanoj, aliaj laboristoj opinias, ke la gein-

struistoj jam havis tro longan libertempon, instruistoj trovas la tri horojn ĉiusemajne ne sufiĉaj. Kelkaj personoj, aŭ eble multaj, opinias, ke reformo estas senutila, se oni ne ŝanĝas la tutan sociordon.

La registaro decidis tra la tuta lando kampanjon de informado kaj de pripensado por precizigi la celojn kaj la metodojn de la reformo. Samtempe kelkaj porinstruistaj seminarioj malfermas siajn pordojn al la aktivaj geinstruistoj por provtempoj. Ĉu tiu eksperimento singardeme limigita alportos solvon? Certe oni longe pridiskutos ĝin. La plejmulto de la geinstruistoj, t. e. la Federacio de Nacia Edukado estas favora al la reformo. Eĉ la plimulto de la Nacia Sindikato de Geinstruistoj (parto de la Federacio), kiu kutime kritikas la registaron, konsentas, ke oni devas atendi. Sed la cirkonstancoj evoluas tiel rapide en nia nuna mondo, ke multaj personoj, ĉefe gejunuloj dubas, ĉu atendi estas la plej bona politiko.

Gaston Turin, Francujo

Profesiaj Komentoj

pri la instruado de fremdaj lingvoj en Usono

Cerpitaĵ el la „*Britanica Review of Foreign Language Education*“

Volumo I, Jaro 1968 — Subtenita de la Amerika Konsilantaro

Pri Lingvistiko

El proksimume 2,000 gazetoj en la mondo kiuj temas pri lingvistiko, nur 400 estas redaktitaj de lingvistoj . . .

Preleginto ĉe la universitato en Berkley, Kalifornio, asertis ke la normala uzo de lingvo emas al „novenkondukado“ (ne estas nur ripetado de tio kion parolanto antaŭe aŭdis), kaj tial estas erareme supozi ke oni lernas lingvojn nur per ripetado kaj komparado. Tiel oni kontestas la aktuale popularan aŭda-parolan metodon de instruado . . .

Estonte la preparado de lingvaj instruistoj devos enhavi pli da studado pri gramatika teorio kaj koniga psikologio . . .

Multaj kondiĉoj, krom la scio de gramatiko, influas la parol-manieron de ĉiu infano; ekzemple, limigita memor-kapableco; neatentemo; ktp. La gramatiko de ĉiu infano nepre sekvas ĝian personan valor-skalon. Tial la parolo de ĉiu generacio iomete malsimilas de tiu de la antaŭa generacio. Vario en parol-formoj povus esti kaŭzitaj de kondiĉoj soci-ekonomiaj . . .

Eksperimente oni instruis al du grupoj de lernantoj la saman ekzercaron. Unu grupo studis nur la ekzercaron; la dua studis kun helpo de „situacia fortigo“ (objektoj, bildoj, ktp., rilate al la studata temo). Ĉi tiu dua grupo pli bone lernis la ekzercaron . . .

Ĉe la Ŝtata Universitato de Novjorko oni instruas la germanan lingvon per la helpo de komputilo, kiu povas konservi registron de la nombro kaj tipo de eraroj faritaj de ĉiu lernanto.

Pri Instruado de Kulturo Per Lingvo

Por la plej multaj profesiaj instruistoj de fremdaj lingvoj, „kulturo“ estas difinita kiel belartoj. Ĉi tiu mallarĝa koncepto ne kondukas la lernanton al preparado por kompreno de aliaj popoloj. Kompreno de la vivmaniero de fremdaj homoj estas grava en mondo de konfliktaj valoroj, kie la limoj kiuj antaŭe izolis kaj protektis la homaron kontraŭ frem-

daj ideoj estas eroziitaj de progreso en la teknologio de komunikado aŭ estas forbatitaj de la kolera kriado de la prematoj en ilia serĉo por pli bona vivo. Kaj por penetri alian kulturon, scio de fremda lingvo estas imperativa . . .

Kulturo en la klasĉambro devas respondi ne nur la demandon „Kie estas la librovendejo?“ sed ankaŭ la demandon „Kie estas la necesejo?“ . . .

Por speguli la vidpunktojn de grandaj grupoj, folkloro superas literaturon. Folkloro estas transdonita aŭ per parolo aŭ per kutimo kaj agado. Ĝi povus esti kantoj, rakontoj, proverboj; tiaj objektoj kiaj bariloj, nodoj, kuketoj, aŭ Paskaj ovo; tiaj agadoj kiaj la ĵeto de salo super unu ŝultron; kaj tiaj kredoj kiaj ke la sambuko bone kuracas la okulojn . . .

Ĉe mezgradaj lernejoj, la sociaj studoj plejparte ignoras la rolon de lingvo en homaj aferoj, dum la plej signifplenaj studoj de lingvo okazas en sociaj sciencoj ĉe kolegioj kaj universitatoj. Kunlaboro inter la fakoj de sociaj studoj kaj fremdaj lingvoj promesas multon por la estonteco . . .

Oni ne devas atendi lingvo-fluecon antaŭ ol uzi bildojn kaj objektojn por ilustraj erojn de fremda kulturo . . .

Unu artikolo sugestas ke aŭ instruistoj aŭ lernantoj preparu mallongajn „kulturajn kapsulojn“ por prezentado dum la lastaj 5 aŭ 10 minutoj de la klashoro. Tiaj „kapsuloj“ devus kontrasti unu malgrandan malsimilecon inter la kulturo de Usono kaj tiu de la studata fremda lando; devus esti ilustritaj; kaj devus enhavi demandojn al la klaso post la prezentado. Oni avertas, tamen, ke tiaj kontrastoj estu uzataj nur post la unuaj tri stadioj de lingvo-studado, por garantii ke la lernanto unue forigu sian vidpunkton ke la fremdulo estu strangulo . . .

Rakontoj kaj legendoj estas ideale taŭgaj por la lingvo-klaso. Kutime ili estas mallongaj; kaj la stilo ofte estas konversacia, tiel donante ekzemplojn de natura dialogo kiujn la lernantoj povos reverki kiel teatraĵetojn, aŭ kiujn la instruisto povos adopti en parolaj ekzercoj por instrui gramatikon . . .

La forigo de kulturaj antaŭjuĝoj devas esti parto de la ĉefa celo de la instruado de lingvo, ĉar, krom se lernanto sentas sin favora al la studata lingvo kaj ĝia kulturo, malmulte da lernado povas okazi.

Pri la Instruado de Fremda Literaturo

Se la celo de literatura edukado estas doni formon al la pasio gajni sperton pri la mondo kaj pri homa malvirto kaj indeco, estas jam tempo por ventumo de la instruplano, por interesi junulojn, por kiuj la tuta ekscito de hodiaŭ kuŝas en la sciencoj . . .

La ĉeso de la postulo por lingva studado ĉe multaj Usonaj kolegioj kaj universitatoj estas klara indiko ke la instruado de literaturo povas antaŭenigi liberalan edukadon per instruado de io pri la homa kondiĉo, por eviti la malhomigon de nia teknologia epoko . . .

En Usono la Hispanlingvaj kaj Franclingvaj fakoj estis ĝenerale pli konsciaj pri la neceso de la instruado de fremda kulturo ol la Germanlingvaj fakoj . . .

Pro bonaj kialoj la novaj instrumentoj emfazas la paroladon. Sed literaturo, kiel vivnecese, estas anstataŭigata per bildstrioj, filmoj, kaj televido. Ke junuloj ankoraŭ trafas literaturon, estas daŭra postulo por nuntempaj verkistoj . . .

Ĉar necesas pli da tempo por instruado de lingvoj per la aŭda-parola metodo, edukistoj diris ke la instruado de literaturo estas la tasko de la superaj lernejoj. Tial la ekzamenoj per kiuj oni rajtas eniri kolegion (College Board Exams), preparitaj de la „Komitato por Takso de Progresintoj“ (Advanced Placement Committee) emfazas literaturan komprenon. Tiu komitato, kiu konsistas el instruistoj elektitaj de nacia „Kolegia Estraro“ (College Board), kaj kiu ĉiujare verkas novajn ekzamenojn, ne postulas ke la tuta diskutado en la klasĉambro estu en la studata lingvo. Ĉi tiu vidpunkto spegulas la senton de la plej multaj profesoroj ĉe kolegioj, ke sur la nivelo de instruado, ideoj estas pli

gravaj ol senkonsekvencaj kaj neperfekta esprimado en la studata lingvo. Tamen oni esperas ke iam eblos instrui literaturon per la fremda lingvo.

La Franclingva ekzameno de tiu komitato komenciĝas per diska prelego, sekvata de demandoj kun elekteblaj respondoj, por provi aŭskultan komprenon. Poste estas alia ero de samformaj demandoj por provi legad-komprenon, kaj tiam Franclingva eseo pri literatura temo. Fine estas ero pri literatura interpreto, en kiu la lernanto legas kelkajn mallongajn eliraĵojn el verkoj antaŭe legitaj, kaj franclingve respondas rilatajn demandojn.

La komenco de la Germanlingva ekzameno de tiu komitato ankaŭ provas aŭskulto-komprenon, sed ne legad-komprenon. Ekzamenatoj ankaŭ povus esti petataj skribi mallongan germanlingvan eseon pri certa temo, kaj respondi demandojn (kun elekteblaj respondoj) bazitajn sur la verkoj kaj verkistoj jam legitaj. Por provi kion la lernantoj povas fari sen preparo, ili legas du nekonatajn poemojn aŭ prozaĵojn kaj respondas rilatajn demandojn. Fine la ekzamenatoj skribas eseon, german- aŭ anglalingvan, pri literatura temo kiun ili povas rilati al legitaj verkoj.

En la hispanlingva ekzameno, la ekzamenato legas du poemojn kaj aŭ angla- aŭ hispanlingve respondas demandaron pri ili. En la dua ero estas dek verkeroj, unu por ĉiu studita verkisto. La ekzamenatoj elektas kelkajn el la verkeroj kaj hispane respondas du rilatajn demandojn. Fine la ekzamenato hispanlingve skribas eseon . . .

Ĉe mezlernejo nur proksimume dek procentoj de la nombro da komencantaj lingvo-lernantoj skribas la „College Board“ ekzamenon; kaj ĉe kolegioj nur dek procentoj de la studentoj en elementaraj lingvo-kursoj studas fremdlingvajn literaturaĵojn.

Ofte lernantoj plendas ke ili forgesas sian aktivan scion de la studita lingvo kiam ili komencas literaturajn kursojn; kaj edukistoj ĉe mezlernejoj kaj kolegioj bedaŭras ĉi tiun mankon de kontinueco en fremd-lingva programo kiu emfazas aŭda-parolan lernadon en siaj komencaj stadioj . . .

Ĉi ĉio kontribuas al la malnova debato pri la temo ĉu oni devus uzi literaturon por instrui fremdan lingvon. Oni argumentas, ke la studado de literaturo ne devus esti la sola apliko de la lingvaj lertoj de la lernanto. Lia celo povus esti la studo de historio aŭ sociologio anstataŭ de literaturo . . .

Multe da esplorado ankoraŭ necesas por konstati la plej bonajn kondiĉojn por la enkonduko de literaturo en la lingvan instruplanon; por trovi metodojn por la instruado de literaturo per lingvo anstataŭ — aŭ krom — lingvo per literaturo; por allogi la hodiaŭan lernanton al literaturo kiel esenca kaj rilata parto de la homa kondiĉo; kaj por konsideri la edukadon de instruistoj pri literaturo egale grava al la edukado de instruistoj pri lingvoj.

. . . Tradukita de S-ino D. Holland (Usono)

La Asociiĝintaj Lernejoj — Projekto de UNESKO

La celo estas amikeco kaj kunlaboro inter la gelernantoj kaj geinstruistoj de la mondo. UNESKO malavare sendas libreton por helpi, sed bedaŭrinde nur en la plej konataj naciaj lingvoj.

Nuntempe 767 lernejoj kaj kolegioj en 59 landoj partoprenas. Oni povas elekti kiel temon iun landon, aŭ iujn landojn, aŭ iun mondproblemon, aŭ iun parton de la laboro de la Unuiĝintaj Nacioj ktp., kolektante la informojn ne nur per libroj sed ankaŭ per internacia korespondado, kaj oni povas uzi iun ajn lingvon. Ekzemple, la infanoj de Deiniol School, Bangor, Caerns., Britujo, amikiĝis kun infanoj el multaj landoj kaj lernas pri iliaj ĉiutagaj vivoj, uzante nur Esperanton. Estus bonege, se multaj aliaj lernejoj, kie Esperanto estas instruata, ekestu „Asociiĝintaj Lernejoj“.

Oni unue devas skribi al la Nacia Komisiono de UNESKO en la propra lando, dirante kian laboron por internacia komprenado la lernejo jam faris, kaj kion oni intencas fari; kaj se tio taŭgas, kaj estas libera loko, oni rekomendas la lernejon al UNESKO, Place Fontenoy, Parizo 7E, Francujo. Kutime la lernejo fariĝas unu el la Asociiĝintaj Lernejoj de UNESKO. La lernejo de tempo al tempo devas raporti al Parizo pri la progreso de la projekta laboro. Ĉiu lernejo ricevos liston de partoprenantoj, kaj informilon pri iliaj elektitaj temoj kaj progreso.

Hilda Tharme, 22, Belmont Ave., Bangor, Caerns., Britujo.

Recenzo:

Lerta Leganto

numero 1

Prezentita de la membroj de Ejanz- La Esperanta Junulara Asocio De Nov-Zelando.

La enkonduko indikas: La serio „Lerta Leganto“ konsistas el 9 legolibroj por uzo kune kun „Secondary School Esperanto, Vol 1“ (University Tutorial Press) de R. H. Markarian kaj J. H. Sullivan. Ĝi estas uzebla ankaŭ sendepende de la originala lernolibro.

Sur paĝo 1 vi trovas katajn figurojn, kiuj parolas frazojn, kiel „mi estas la inteligenta kato“, „mi kantas“, „mi manĝas“.

En la dua parto de la paĝo la lernanto devas serĉi vortojn el vorto sen senco, ekz. plumontru (plumo-montru) kaj formi frazon. La postulanta frazo: „Traduku ĝin en nacia n lingvon kaj **centigu**, ke ĝi estas bona frazo“, tucerte havu la sencon“ certigu bonan frazon!“.

Krucforma enigmo finas la paĝon.

La dua paĝo komenciĝas per bildoj indikantaj kolorojn sen la koloroj mem. Do, la aldona demando: „kio estas blua?“, estas teoria, ne konkreta. Sekvas furiozaj bildoj, sur kiuj la koloroj ŝprucas al ĉiuj flankoj. Tiamaniere ekestas novaj koloroj. Sur la bildo staras trifoje „pupitro“, sed ĝi nenie estas videbla. Tamen la sekvantaj kolordemandoj estas laŭ ekzercaj vidpunktoj bonaj.

Bildo sur paĝo 3 indikas ĉambrom. Ĉiuj frazoj sub la bildo efektive abunde paroligas la gelernantojn. Tamen. se oni skribis: „Sur la tablo estas kvar libroj“, kaj „Li laboras sur la tablo“ kaj li ne estas sur la tablo, oni certe vekas erarajn imagojn, „ĉe“ estus korekta. Bonega estas la ideo elserĉi la ŝanĝojn el du bildoj.

La „bildrakonto (paĝo 4) estas interesa, sed la buso neestas „li“ nur povas esti „ĝi“. Por „ligno-skatolo“ mi preferus „lignujo“.

La bildoj sur paĝo 6 demonstras apartan anglan humoron. Oni devas lerni ĝin (Kie estas la instruisto? Li estas en la leono).

La paĝo 7 daŭrigas la apartan humoron. Laŭdinda estas la „Taglibro de kraĵono“ Boneta rakonto!

La paĝo 8 finfine prezentas amuzojn, kiuj tamen instigas la gelernantojn penseme aĝi.

Resume: „La Lerta Leganto“ atestas la seriozan klopodon de la verkintoj disponi al la infanoj la urĝe bezonatajn legaĵojn, nur ŝajnas al mi, la maniero estas tro angla kaj ligata al la konkerna lernolibro. Kaj paroligi devus la lernolibro mem, sed la multaj demandoj ne kreas lertan leganton, sed pli lertan respondanton. Eble la aŭtoroj prezentos estonte pli da malgrandaj rakontaj?

C. Kubsch

Pri Internacia Instruista Ekzameno

La regularo de la Internacia Instruista Ekzameno estas bona. Sed rilate la membrojn de la ILEI-komisiono vi devus komisi ne nur 3 personojn sed pli. Mem la konkreta komisiono ne povus konsisti nur el tri personoj, almenaŭ 10 devus havi rajton esti membroj. Do, ILEI komisiu la prezidanton, kiu devige devas ĉeesti ĉiujn ekzamenojn, kaj laŭ lokaj eblecoj la prezidanto poste invitu el la ceteraj 7 tiujn du, kiuj estas en la konkreta situacio la plej oportunaj.

En mia Ministerio mi nun klopodas aranĝi la starigon de Ŝtata Pedagogia Ekzamenkomisiono, kiu donus ŝtatan diplomon egalrajtan kun la Universitato. La antaŭtraktadoj estas esperigaj. La centro de tiu komisiono estus nia universitato en Budapeŝto. Ni povas iomete kunordigi la du komisionojn: nome tiu, kiu faras internacian ekzamenon en Hungario laŭ la kondiĉoj de ILEI-regularo povas samtempe akiri ankaŭ ŝtatan hungaran diplomon, kiu estas ŝtate rekonita ankaŭ en alia lando laŭ la validaj interŝtataj konvencioj. Sed la aranĝo de du aferoj povas iri tute sendepende unu de la alia.

István Szerdahelyi

D Dokumentado

Dekreto

de la 23a de decembro 1964 por aranĝo de la ekzameno por akiri ateston pri kapableco doni bazan instruadon en la fako Esperanto (Ekzamendekreto baza instruado Esperanto).

a) Ni JULIANA, pro la graco de Dio, Reĝino de Nederlando, Princino de Oranje Nassau, ktp., ktp., ktp.

b) Laŭ la propono de la ŝtata sekretario pri instruado, artoj kaj sciencoj de la 5-a de decembro 1964 no: 26 21 92, ĉefsekcio Baza Instruado;

c) atentinte artikolon 45,5-an paragrafon, de la Instrulerneja Leĝo, tiom kiom ĝi rilatas al la ekzameno por akiri la kapablecon doni bazan instruadon en la fako Esperanto;

ĉ) aŭskultinte la Instruan Konsilantaron, sekcio por la ĝeneral-eduka baza instruado, la porinstruista instruado kaj la etulinstruado (avizo de la 30-a de septembro 1964, Nro. 137 Kw);

d) aŭskultinte la Ŝtatan Konsilantaron (avizo de la 25-a de novembro nro. 44);

e) rigardinte la pli detalan raporton de la ŝtata sekretario pri instruado, artoj kaj sciencoj de la 15-a de decembro 1964, Nro: 267 681, ĉefsekcio Baza Instruado;

f) Aprobis kaj komprenis:

g) Artikolo 1

Por la aplikado de ĉi tiu dekreto estas komprenata pri: „Nia ministro“: Nia ministro pri Instruado, Artoj kaj Sciencoj „la atesto“: la atesto pri kapableco, menciita en art. 41 ĉe c de la Instrulerneja Leĝo por doni bazan instruadon en la fako Esperanto; „la komisiono“: komisiono kiel celita en art. 2.

Artikolo 2

1. La ekzameno okazas minimume unufoje en jaro pere de unu aŭ pluraj komisionoj, ĉiujare starigitaj de Nia ministro.
2. La nombro da komisionoj sumas tiom, kiom Nia ministro opinias konsilinda.
3. La ekzameno povas okazi sur pli ol unu loko.
4. Nia ministro indikas la lokojn, kie la komisionoj kunvenos.

Artikolo 3

1. Nia ministro nomas unu el la membroj de la komisiono kiel prezidanton.
2. La ĉefinspektoro de la porinstruista instruado estas laŭofice konsilanta membro de la komisiono.
3. Laŭ propono de la prezidanto Nia ministro nomas el la membroj de la komisiono vicprezidanton kaj sekretariojn.
4. Se la amplekso de la laboro tion necesigas, la komisiono povas nomi unu el la membroj kiel vicsekretariojn.
5. Se nia ministro starigas pli ol unu komisionon li nomas unu el la prezidantoj kiel ĝeneralan prezidanton.

Artikolo 4

Nia ministro anoncas en la Nederlanda Ŝtata Gazeto la tagon, kiam la ekzameno komenciĝos, la limdato antaŭ kiu la kandidatoj por la ekzameno devas aliĝi, kaj krome la manieron laŭ kiu tiu aliĝado devas okazi kaj kiel la ekzamenkotizo devas esti pagata.

Artikolo 5

Antaŭ ol li estas akceptata por la ekzameno, la kandidato transdonas:

- a) resumon el la registro pri naskiĝoj aŭ el la civitana registro menciante la nomon de la kandidato;
- b) sian ateston pri kapableco kiel instruisto aŭ kopion ratifikitan de la inspektoro pri la baza instruado.
- c) la pruvojn, ke la sumo postulata por la partopreno en la ekzameno estas pagita.

Artikolo 6

La por la partopreno en la ekzameno pagenda mono sumas dudek kvin guldenojn.

Artikolo 7

Kiel eble plej baldaŭ post la en artikolo 4 menciita limdato la prezidanto komunikos al la kandidatoj la lokon kaj la tagojn de ilia ekzameno.

Artikolo 8

Kiel eble plej baldaŭ post la en artikolo 4 menciita limdato la prezidanto komunikos al al Nia ministro:

- a) raporton pri ĝiaj laboroj kaj koncizan resumon de la rezultoj de la ekzameno kaj de la rimarkigoj, kiujn la ekzameno al la komisiono kaŭzis fari;
- b) ekzempleron de la ekzamena horaro (programo)
- c) ĉeestliston, kiujn la ĉeestintaj membroj ĉiutage subskribis;
- d) laŭnombran komunikon pri la rezultoj de la ekzameno en de Nia ministro fiksita formo
- e) laŭalfabetan liston pri la sukcesintoj en de Nia ministro fiksita formo;
- f) registron de poentoj pri ĉiuj ekzamenitoj;
- g) tri ekzemplerojn de la skribaj taskoj.
- h) komunikon pri la nombro de skribaj laboroj, korektitaj kaj prijuĝitaj de ĉiu membro (de la komisiono)
- i) laŭnoman komunikon pri la membroj, kiuj kompilis skribajn taskojn;
- j) kvar ekzemplerojn de la reguligo de kontoj.

Artikolo 9

1. La de la komisiono por la ekzameno farendaj kostoj, escepte de la administradkostoj, estos kompensitaj el la Regna kaso, se kaj tiom, kiom ili estas aprobitaj de Nia ministro.
2. Kiel rekompenson de la administradkostoj Nia ministro fiksas po kandidato sumon, kiu el la Regna kaso estos disponigata al la sekretario.
3. La membroj de la komisiono ricevas el la Regna kaso kompenson por vojaĝ- kaj restadkostoj; Krome ili rajtas ricevi vakadmonon.
4. La membroj, komisiitaj kompili aŭ korekti kaj prijuĝi skriban laboron, ricevas por tio rekompenson, kiu estas kalkulita laŭ de Nia ministro fiksita normo.

Artikolo 10

1. La ekzameno konsistas el skriba kaj parola partoj.
2. La amplekso de la scio postulata de la kandidato pri ĉiu parto, estas menciita en la al ĉi tiu dekreto ligita programo kun aldona klarigo.
3. Nia ministro povas decidi- laŭ la normoj, kiujn Nia ministro aŭskultinte la komisionon, fiksas- ke la komisiono kandidaton nesukcesintan en la ekzameno, surbaze de li akiritaj rezultoj, ĉe rea partopreno en ĉi tiu ekzameno, liberigas de esplorado pri unu aŭ pluraj ties partoj.

Artikolo 11

1. La skribaj ekzamentaskoj estas por ĉiuj komisionoj egalaj. Ili estas privediciditaj de la komisiono aŭ komisionoj sub gvidado de la prezidanto aŭ, se estas starigitaj pli da komisionoj, de la ĝenerala prezidanto, kaj estas presitaj fare de l' ŝtato kun la postulata zorgo pri sekreteco.
2. La skriba laboro de ĉiu kandidato estas korektita kaj prijuĝita de minimume du membroj.
3. La skriba laboro estas farata sub konstanta kontrolo. Kiu kulpiĝas pro trompo, estos tuj ekskluzivita al plua partopreno en la ekzameno.
4. La skriba parto de la ekzameno okazas nepublike. La parola ekzameno estas publika, sed la prezidanto povas tion limigi, se kaj tiom kiom tio estas necesa por la glata funkciado de la ekzameno.

Artikolo 12

Kiel eble plej baldaŭ post la skriba parto la prezidanto komunikas al la kandidato la de li por la skriba parto akiritajn poentojn. Samtempe li povas nome de la komisiono konsili al li rezigni pri la parola parto.

Artikolo 13

1. La parola esplorado pri la kandidatoj okazas en ĉeesto de minimume du membroj de la komisiono.
2. Dum la parola parto la kandidatoj estas pridemandataj unuope.

Artikolo 14

1. Prijuĝante la kandidatojn, la komisiono igas sin informi de la membroj, kiuj ekzamenantiĝis.
2. La juĝo pri la scio de la kandidatoj estas esprimita pri ĉiu parto per la ciferoj 1 ĝis 10 inkluzive, laŭ jenaj signifoj:

10 — elstara	5 — preskaŭ sufiĉa
9 — tre bona	4 — nesufiĉa
8 — bona	3 — tre malsufiĉa
7 — pli ol sufiĉa	2 — malbona
6 — sufiĉa	1 — tre malbona

Artikolo 15

1. La decido pri la rezulto de la ekzameno okazas en kunveno de la komisiono. Ĝi konsideras la normojn, kiujn fiksis Nia ministro, aŭskultinte la komisionon.
2. La komisiono decidas laŭ plimulto da voĉoj.
3. Ĉe voĉekvilibro la prezidanto decidas.
4. Laŭ la normoj menciitaj en la unua paragrafo, Nia ministro povas decidi, en kiuj kazoj kandidato nesukcesinta en la ekzameno, surbaze de la de li akiritaj rezultoj, povas esti allasata al reekzameno pri unu aŭ pluraj partoj. Ĉi tiu reekzameno okazos proksimume je la jarŝanĝiĝo.

Artikolo 16

1. La rezulto de la ekzameno estas tuj komunikata al la kandidato.
2. Ĉiu kandidato ricevas komunikajon subskribita de la prezidanto pri la poentoj kiujn li akiris por ĉiu parto kaj pri la rezulto de la ekzameno.
3. Al la kandidato sukcesinta en la ekzameno, la diplomo estas donata senpage.
4. Se kandidato pro kaŭzo, akceptebla laŭ la opinio de la prezidanto, estis malhelpata partopreni en la skriba aŭ parola parto de la ekzameno, oni povas — eventuale — doni al li la eblecon plenumi trian parton de la ekzameno poste. La skriba tasko estu tiam kiel eble plej identa laŭ amplekso kaj kvalito.

Artikolo 17

1. Post la fino de la kunsidoj de la komisiono la prezidanto sendas la skriban laboron de la kandidatoj kun la por ĉiu el la partoj de la ekzameno esprimita prijuĝo al Nia ministro.
2. Dum tri monatoj post la fino de la ekzameno ĉiu ekzamenito rajtas trarigardi sian skriban laboron kaj la pri tiu esprimitan prijuĝon ĉe la inspektoro pri la baza instruado en kies inspektodistrikto li loĝas. Por tio li direktas peton al Nia ministro, kiu sendas la skriban laboron kaj la pri tiu esprimitan prijuĝon al la koncerna inspektoro.
3. Post la trarigardo la inspektoro resendis la al li senditajn dokumentojn al Nia ministro kun noto pri la dato, kiam la trarigardo okazis.
4. Post la limdato de tri monatoj Nia ministro igas la skriban laboron detruui.

Artikolo 18

Ĉi tiu dekreto povas esti citita kiel „Ekzamena dekreto baza instruado Esperanto“.

Nia ministro pri instruado, artoj kaj sciencoj estas ŝarĝita per la realigo de ĉi tiu dekreto, kio estos publikigata en la Ŝtata Gazeto kaj de kiu estos sendata kopio al la Ŝtata Konsilantaro kaj al la Ĝenerala Financkontrollejo.
Soestdijk, la 23an de decembro 1964

JULIANA.

La Ŝtatekretario pri Instruado,
Artoj kaj Sciencoj,

GROSHEIDE

Eldonita la dekkvaran de januaro 1965
La Ministro pri Justico

Y. SCHOLTEN .

Programo por la ekzameno por akiri la ateston pri kapableco doni bazan instruadon en la fako Esperanto.

1. Scio pri la gramatiko de Esperanto.
2. Lerteco en la parola uzo de Esperanto.
3. Lerteco en la skriba uzo de Esperanto.
4. Lerteco en la traduko en Esperanton.
5. Kono de kelkaj en Esperanto verkitaj aŭ tradukitaj libroj kun literatura valoro kaj pri kelkaj artikoloj en Esperanto-periodaĵoj.
6. Sufiĉa kono de didaktikaj nocioj rilate al la instruado en Esperanto.

Aldona klarigo.

La skriba ekzameno ampleksas:

1. la tradukadon de prozaĵo el la nederlanda lingvo en Esperanton;
2. la ellaboradon de nombro da demandoj kaj taskoj koncerne tekston en Esperanto.

La parola ekzameno ampleksas:

1. esploradon pri la scio de la gramatiko koncerne iun difinitan tekston;
2. esploradon pri la prononcado de la kandidato laŭ la legata teksto;
3. esploradon pri la parolkapableco de la kandidato per konversacio i. a. pri la enhavo de la legitaj libroj kaj artikoloj;
4. esploradon pri la envidpovo (nocio pri) en kaj la aplikado de la didaktikaj elementoj ĉe la instruado en Esperanto.

La parola ekzameno okazas en la lingvo Esperanto kun escepto de la esplorado menciita sub punkto 4.

Apartenas al la Reĝa Dekreto de la 23-an de decembro 1964, Stata Gazeto Nr. 574

Konata al mi
La Statsekretario pri Instruado, Artoj kaj Sciencoj,
GROSHEIDE.

Per ĉi tiu numero finiĝas la unua jarkolekto de Internacia Pedagogia Revuo. Mi dankas al ĉiu, kiu abonis la revuon aŭ helpis en la abonigado al ĝi. Sendube, la starto de IPR ne estis facila, tamen ni sukcesis, kvankam kun iometa prokrasto, prezenti tri numerojn en digna kaj plaĉa formo, kiu egalas al similaj revuoj en naciaj lingvoj.

Mi petas vin renovigi vian abonon por la dua jarkolekto. La abonkotizo estas vere modesta kaj minimuma. Neniu revuo, eĉ la grandaj en naciaj lingvoj, ne povas ekzisti nur de la abonkotizo. La eldonado de IPR estas subtenata de mia libroservo kaj de miaj aliaj Esperanto-aktivecoj, ĉar mi taksas grava la aperadon de pedagogia revuo kiel IPR.

Se mi do petas vin, subteni mian libroservon kaj eldonejon aĉetante Esperanto-librojn kaj miajn aliajn eldonaĵojn, tiu peto okazas ankaŭ en la intereso de nia Internacia Pedagogia Revuo.

Ludwig Pickel
Eldonanto de IPR

Abonado al IPR en orienteŭropaj landoj

Mendojn al Internacia Pedagogia Revuo en Bulgario, Hungario kaj Pollando bonvolu direkti al:

Bulgara Esperantista Asocio, Instruista Sekcio bulv. Ĥr. Botev 97, Sofio
Hungara Esperanto-Asocio, Kenyérmező u. 6, Budapest VIII
Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, Warszawa 1

Interesuloj por IPR en Ĉeĥoslovakio turnu sin al:

S-ro Karel Kraft, Oborište 107 okres Pribram.

Infanoj de la tuta mondo

Sub la supra titolo la urbo Avignon (Francujo) preparas ekspozicion de infanaj desegnaĵoj.

La ekspozicio estos malfermata en la komenco de julio kaj estos montrata dum julio kaj aŭgusto.

La plej bonaj kontribuaĵoj estos konservitaj por krei konstantan muzeon pri infana arto.

Por demonstri la efikan rolon de Esperanto, mi invitas ĉiujn samideanojn de ĉiuj regionoj de la mondo, sendi bonajn desegnaĵojn, kiuj elvokas vivon, zorgojn, ĝojojn, safe-rojn kaj feliĉojn, sopirojn de la infanoj.

Eble personoj, kiuj jam organizis similan ekspozicion povus pruntedoni al ni sian materialon.

S-ino S. Humm, Chemin des Neuf Peyres, F-84 Avignon, Francujo

Grava alvoko

Ĉu Udo Jürgens kantos en Esperanto ?

Dum jaroj ni esperantistoj revas pri miraklo, ke mondkonata kantisto surdiskigu kanton aŭ ŝlagron en Esperanto. Ĉu la revo realiĝas nun, dependas de ni esperantistoj. Prezentiĝas unika ŝanco, ke la plej konata ŝlagro-kantisto, ŝlagroaso n-ro 1, UDO JURGENS, kantos du kantojn en Esperanto. Lia produkto-firmao estos preta surdiskigi tiujn kantojn.

Sola kondiĉo estas, ke la Esperanto-publiko estas preta, aĉeti 10 000 ekzemplerojn de tiu disko. Unuavide tiu nombro estas tro granda por la Esperanto-merkato. Por garantii al la firmao la vendadon de 10 000 diskoj, necesas kapitalo de 30 000 GM. Mi estas preta transpreni la financon riskon de tiu entrepreno, sed sen la subteno de la Esperanto-movado tiu unika ŝanco ne estas realigebla.

Ekzistas diversaj eblecoj por helpo kaj subteno:

1. Ĉiu esperantisto, kiu vere interesiĝas pri la disvastigo de Esperanto, aĉetas minimume 2 diskojn. La prezo por 1 disko estos 5,— GM. Ĉiu esperantisto donacas la diskon al siaj gefiloj, parencoj, amikoj, junularaj rondoj ktp. kaj instigas aliajn homojn aĉeti la diskon.
2. Esperantistoj kaj organizaĵoj povas pruntedoni al la libroservo Pickel certan sumon por financi la entreprenon: 100 GM, 500 GM, 1 000 GM. Tiuj sumoj estos deponitaj en banka konto en Nürnberg ĝis la livero de la diskoj. Por la pruntedonita sumo estas pagataj procentaĵoj de 5%. Unu jaron post la apero de la disko la pruntedonitaĵo estos repagita al la donanto kun la procentaĵoj.
3. Oni povas sendi mondonacojn kun la celo donace sendi diskojn al nepagipovaj landoj, al Afriko kaj Azio.

Libroservoj kaj E-organizaĵoj ricevas revendistan rabaton de 25%.

Unuopaj esperantistoj, kiuj mendas minimume 10 diskojn, ricevas aldone senpage 1 diskon.

Se pro iu ajn kaŭzo la disko ne realiĝos, ĉiuj antaŭpagitaj sumoj kaj pruntedonaĵoj estos repagitaj.

Ludwig Pickel

Eldonejo kaj Libroservo

D-85 Nürnberg 2, Postfach 2113

Novaj Esperanto-libroj

ETA VIVO, poemaro de Clelia C. Guglieminetti, Stafeto Serio Beletraj Kajeroj, 12 x 18,5 cm, 143 paĝoj, prezo 8,— GM.

HUMOROJ, originala poemaro de William Auld, Stafeto Serio Beletraj Kajeroj, 12 x 18,5 cm, 115 paĝoj, prezo 8,— GM.

KANTOJ KAJ ROMANCOJ de Heinrich Heine, el la germana verse tradukis K. Kalocsay kaj G. Waringhien, Stafeto, Belliteratura Serio, 16 x 22,5 cm, 383 paĝoj, prezo tolbindita 24,— GM, broŝurita 19,20 GM.

PRI INTERNACIA LINGVO — DUM JARCENTOJ, eldiroj kaj skribaĵoj de pli ol 200 fame konataj personoj kaj instancoj pri internacia lingvo, kompilita de Isaj Dratwer, CED-eldono, 15 x 21 cm, 141 paĝoj, prezo 6,60 GM.

PAŜOJ AL PLENA POSEDO, perfektiga antologia lernolibro de W. Auld, 30 antologiaj literaturaj legajoj, vortara difino de 1682 novaj vortoj, 176 ekzercoj, dua eldono, 12,5 x 19,5 cm, 238 paĝoj, prezo 8,— GM.

NOKTO DA TIMO kaj aliaj noveloj, originale verkitaj de Bertram Potts, Novzelando, 14,5 x 21 cm, 80 paĝoj, prezo 5,50 GM. Eldono de Dana Esperanto-Eldonejo. — Arktaj regionoj, Novzelando kaj Anglujo kun Marjorie Boulton kiel ĉefrolulino estas la scenejoj de tiu nova eldonaĵo.

NI AKTORAS . . . , 3 komedietoj de Marjorie Boulton, 14,5 x 20,5 cm, 36 paĝoj, prezo 2,20 GM.

LIBERO KAJ AMO, elektiaj poemoj de Petöfi, en la traduko de K. Kalocsay, Corvina Budapest, 10,5 x 19 cm, bele bindita, 260 paĝoj, prezo 9,20 GM.

LA SEP REĜIDOJ de Béla Balázs, fabelo por infanoj malgrandaj kaj grandaj, kun multaj koloraj ilustraĵoj, 25 x 33,5 cm, 24 paĝoj, bindita, prezo 6,60 GM.

ĈIAMA MEMORKALENDARO pri personoj kaj okazaĵoj en la historio de KELI kaj en kristanaj familioj, kompilita de Erich Quentin, 15 x 20 cm, 48 paĝoj, broŝurita 1,50 GM.

KRUKO KAJ BANIKO EL BERVALO de Louis Beaucaire, meldecaj anektdoj por neprudaj legantoj, 15 x 21 cm, 144 paĝoj, ilustrita, TK, prezo 17,10 GM.

ESPERANTO a new approach de William Auld, lernolibro de Esperanto en angla lingvo, 13 x 19 cm, 100 paĝoj, prezo 6,— GM.

BONA ŜANCO de D-ro Werner Bormann, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, dekdu prelegoj pri la internacia lingvo kaj la sociaj sciencoj, 16 x 22 cm, 247 paĝoj, broŝ. 14,40 GM.

TRA LANDO DE INDIANOJ de Tibor Sekelj, el la hispana esperantigis Ernesto Sonnenfeld, 12 x 19 cm, 186 paĝoj, broŝ. 18,— GM, bind. 22,50 GM.

LA STRUVELPETRO, beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj de Heinrich Hoffmann, Esperanta traduko de J. D. Applebaum, 21 x 28 cm, 24 paĝoj, bind., kolore ilustrita, 18,90 GM.

La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj

Tiu libro estas grava kontribuajo al la scienca literaturo en Esperanto. Gijaj aŭtoroj, konataj fakuloj, devenas el 8 landoj:

B. Popovic, Jugoslavio, Rigardo en la Mikro- kaj Makrokosmon

V. Peevski, Bulgario, Natursciencaj Fundamentoj pri Kosmonaŭtiko kaj Pac-Cela Utiligo de Satelitoj

Ivo Lapenna, Britujo, Internaci-Juraj Problemoj de Spacveturado

Adam Gula, Pollando, Elementaj Korpuskloj kaj la Strukturo de Materio

Wim de Smet, Belgujo, Nunaj Mondperceptoj per la Biologio

A. Albault, Francujo, Superpopolado, Konsekvenco de Kronika Malsato

Erkki Kääriäinen, Finnlando, Pri la Postsekvoj de la Glacia Epoko en Fenoskandio

Klaus Wandelt, Germanujo, Cibernetiko

Hans Straßl, Germanujo, Ranger Fotas la Lunon

Krome la libro entenas bibliografiojn, biografietojn und fotojn de la aŭtoroj kaj antaŭparolon de Uwe Joachim Moritz.

Bibliografiaj notoj: Formato 13,5 x 21 cm, 170 paĝoj, broŝurita, kun ilustraĵoj, Eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, 1967.

Prezo 9,60 GM + afranko.

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Eldonejo kaj Libroservo, Postfach 2113, 85 Nürnberg 2, Germanujo, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de la
Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Jarkolekto 1, n-ro 1
Aperas trifoje pojare

Abonprezo 6,— GM, unuopa kajero 3,— GM

Redaktoro: Helmut Sonnabend, rektoro

Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, Germanujo

Eldonejo: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, Germanujo

Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56

Bankkontoj: Stadtparkasse Nürnberg 90 157

Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5 606 489

Aŭstra bankkonto: Österreichische Länderbank Bregenz 8 891 611

Svisa bankkonto: Schweizerische Volksbank St. Gallen 629 240

La abonprezon oni pagu al la eldonejo

Tarifo por anoncoj:

1 paĝo 250,— GM 1/2 paĝo 125,— GM

1/4 paĝo 80,— GM 1/8 paĝo 40,— GM

Anoncetoj —,25 GM po vorto

Ludwig Pickel

Eldonejo kaj Libroservo
eldonas jenajn publikigaĵojn:

GERMANA ESPERANTO-REVUO

Informa, kleriga, progresema revuo en Esperanto
Ok numeroj ĉiujare

Abonprezo 13,— GM

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Oficiala organo de ILEI
Tri numeroj ĉiujare

Abonprezo 6,— GM

DOKUMENTE — INFORMATIONEN

Serio de dokumentoj pri Esperanto
kaj internacia lingvoproblemo en germana lingvo Kajero 1 Prezo 1,— GM

ESPERANTO aktuell

Germanlingva informilo pri aktualaj okazaĵoj kaj problemoj
de la Esperanto-movado
Kvar numeroj ĉiujare

Abonprezo 3,— GM

PILO-PRESS

Internacia Informservo
Esperanta eldono aperas ĉiusemajne
Germana eldono aperas dufoje monate
Petu provekzempleron!

Abonprezo 15,— GM
Abonprezo 7,— GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Eldonejo
D-85 Nürnberg 2, Postfach 2113